

Dr. Leono Zamenhof, Warszawa (Varsovio)
W. M. Page, advokato, Edin-
burgh
Ernest Archdeacon, Paris
J. Gili Norta, komercisto,
Barcelona
H. Fischer, grandindustriisto,
București
Teo Jung, Horrem b. Köln
Frans Schoofs, komercisto,
Antwerpen (Anvers)
P. v. Medem, bank- kaj
fabrikdirektoro, Kaunas.

Tarifon

vidu sur speciala folio, kiu estas al-
donata al ĉiu specimena kaj unua
numero de nova abono.

ESPERANTO

TRIUMFONTA

Oficiala Organo de la XV-a Universala Kongreso de Esperanto. — Publikigilo de multaj gravaj Esperantistaj organizaĵoj.
Tendenco: Neŭtrala - Tolerema - Esperantista - Internacia - Universala.

Aperas semajne. — Senpagaj aldonoj: „Internacia Komercio“ (praktika) kaj monata „Revuo“ (literatura, popolsciencia).

6. 5. 1923

Administrejo:

(sufiĉa adreso)
Esperanto Triumfonta,
Horrem bei Köln, Germanl.

Redaktistaro:

Cefredaktisto: Teo Jung.
Kunredaktisto: M. Butin.
Literatura red.: Zanonl.

Kunlaborantoj

inter la Esperantistaro de
la tutmondo.

Manuskriptojn oni skribu nur sur
unu flanko de l' papero.

Tarifon

vidu sur speciala folio, kiu estas al-
donata al ĉiu specimena kaj unua
numero de nova abono.

Antwerpen-Anvers, Barcelona, București, Edinburgh, Horrem b. Köln, Kaunas-Kowno, Paris, Warszawa

Jam 3000 kongresanoj por la 15-a.

XV-a Universala Kongreso de Esperanto en Nürnberg.

5-a Cirkulero.

1. Protektoreco. Lia Moŝto, prezidanto de la Germana Respubliko, Friedr. Ebert, bonvolis akcepti la honoran protektorecon por la XV-a.

2. Aliĝoj. Aliĝis ĝis fino de aprilo 2910 kongresanoj el 36 landoj. Bedaŭre ni devis sciiĝi, ke diversaj eksterlandaj samideanoj hezitas la aliĝadon, timante personajn malfacilaĵojn dum vojaĝo kaj restado. Konsternite pri tio, ni rapidas konstati, ke ne estas kaŭzo por tiaj timoj.

3. Kongreskotizo. Pro neantaŭvidita evolucio de la valutaj cirkonstancoj, la projektita plialtigo de la kotizo deponit 1. junio ne okazos, escepte por aŭstroj, germanoj, hungaroj, poloj kaj rusoj. Por la lastnomitaj landanoj, pro certigo de la budĝeto, plialtiĝos la kotizo deponit 1. junio al 10000 gmk.

4. Kongresbanko. La kongresbanko estas la firma Walk & Grün, Nürnberg. Ĝi starigos de 2.—8. aŭgusto apartan kontoron en la kongresejo.

5. Financoj. Ni preferas ricevi la kotizojn el eksterlando per monbiletoj. Tiuj kongresanoj, kiuj tamen ŝatas pagi per bankĉekoj aŭ transpagiloj, bonvolu uzi, por ŝpari al si kaj al ni spezojn, la jenajn bankojn kunigitaĵ kun la kongresbanko: Allgemeiner Böhmischer Bankverein, Prag; Kronische Filiale des Wiener Bankvereins, Zagreb; Britisch-Ungarische Bank, Budapest; Österreich. Creditanstalt für Handel u. Gewerbe, Wien; Credito Italiano, Mailand; Schweizerische Bankgesellschaft, Zürich; Rotterdamsche Bankvereeniging, Rotterdam; Kleinwort Sons & Co., London E. C. 3., 20 Fenchurch Street.

6. Fakkunsidoj. Estas plue anoncitaj la jenaj fakkunsidoj:

- Univ. Esp. Asocio Junulara: adr. Aleks. Hirsemann, Breslau, Herzogstr. 36;
- Vegetara Ligo Esperantista: adr. Oskar Bünemann, Hamburg-Fuhlsbüttel, Alsterkrugchaussee 586.
- Katolikoj: adr. J. Stahl, Nürnberg, Jakobsplatz 17/II.
- Int. Ligo de Esp. Poŝtistoj (lepo): adr. sup. registara konsilisto Otto Reber, Bamberg, Kapuzinerstr.

MALRIĈA EN SPIRITO.

Teatraĵo en du aktoj kaj unu Interakto.
Originale verkita de H. J. Bulthuis, L. K.

(1-a Daŭrigo.)

Johano (kapitano la verlon de sia kapo). Jes, mia kapo trafis la ŝtonojn.

Patrino. Vi kuŝis senmove, kaj ĉiu timis, ke la falego mortigis vin. Sed vi vivis ankoraŭ. La viroj portis vin hejmen. La doktoro venis kaj konstatis cerbo-ekskuo. — Longe vi kuŝis mortemalsana, sed fine vi resaniĝis. — Post tiu tempo vi ne povis plu labori kiel masonisto.

Johano. Nun mi memoras — precipe la ŝtonojn —

Patrino. Kaj nun vi plektas korbojn.
Johano. Kaj miaj haroj subite blankiĝis, ĉu ne?

Patrino. Jes, pro teruro, dum vi pendis tie.
Johano. Pro teruro. Mi memoras. Kaj la maljuna Heleno diris, ke mi estas idioto —

Patrino. Vi tute ne estas tia; vi estas, kiel mi jam diris: malriĉa en spirito.

Johano. Tio estas skribita tie en la biblio, ĉu ne?

Patrino. Jes, tamen ne pensu tro multe pri tio! Jam laboru, tio distros vin!

Johano (laboras; post momento). Patrino!?

Patrino. Kio estas?

Johano. Kial Alberto estas soldato?

Patrino. Mi jam ofte diris, ke mi ne povas klarigi tion al vi. Eble, ĉar la Imperiestro intencas ataki Rusujon per granda armeo.

Johano. Kial la Imperiestro volas ataki Rusujon?

Patrino. Eble por batali kontraŭ la rusa imperiestro.

e) Franka Esp. Ligo: adr. la sama.

f) Framasonoj: adr. C. Barthel, Frankfurt a. M., Wöhlerstr. 14.

g) Instruistoj: adr. Hans Kaupfer, Nürnberg, Parkstr. 13/II.

h) Kursgvidantoj: adr. Emil Kreibich, Kladno (Bohemio), želežárny.

i) Eksmilitintoj kaj militviktimoj: Karl Dörfel, Mühlendorf a. L., Bavario, Siedelungs-werk.

k) Interfoira Komisiono: adr. Prof. D-ro Dietterle, Leipzig-Schl., Seumestr. 10.

7. Kongreslibro. La presado de la kongreslibro komenciĝis. Krom la oficiala parto ĝi enhavas ankaŭ reklamojn, kiuj peras unikan okazon por internacia negoca propagando. Ni petas ĉiujn samideanojn interesigi gravajn firmojn kaj societojn de ilia urbo, por ke ili rekte interrilatu kun LKK. Unu paĝo kostas 120000, duona paĝo 65000, kvarona paĝo 35000 gmk.

8. Poŝtkartoj. Belaj ilustr. poŝtkartoj pri Nürnbergaj vidindaĵoj kun Esp. teksto jam nun estas liverebaj kontraŭ antaŭpago. La prezoj (inkluzive sendkostoj) estas por 30 diversaj kartoj 4000, por 15 kartoj 2500 gmk.

9. Kongresarangoj. En la kadro de la oficiala programo okazos: teatraĵo prezento de „Natan la Saĝulo“ de Lessing kaj de la Mozarta opereto „Bastien kaj Bastienne“, instrument- kaj kant-koncertoj, diservoj en katolika, protestanta kaj hebrea ĉefpreĝejo, internacia reĝadmalineo, kabareda vespero, internacia kostumbalo kun enmetitaj popoldancoj, komuna tutaga ekskurso al Rothenburg (mondkonata mezepoka juvelujo). Laŭ deziro ni aranĝos postkongresajn ekskursojn al München (Alpoj) kaj Leipzig.

10. Vivkostoj. Ni ricevas ĉiutage demandojn pri la lokaj prezoj por loĝado kaj manĝado. Pro la malslabileco de la cirkonstancoj estas neeble starigi jam hodiaŭ definitivan dumkongresan prezaron. La nuntempaj tagkostoj estas (sen trinkaĵoj): unuaranga hotelo 50000, duaranga hotelo aŭ komforta privataĵejo 25000, bona privataĵejo kaj manĝado en restoracio 12000, komuna manĝado kaj dumnoktado 5000 gmk.

11. Vojaĝkostoj. Ĉar la somera horaro aperos en la venontaj semajnoj, ni povas publikigi ĉiujn rilatajn detalojn nur en nia junia cirkulero.

Johano. Alberto tamen revenos, ĉu ne?

Patrino. Dio ĝin volul (Ŝi ĝemegas, ĉesante ŝpini kaj rigardante antaŭ sin, kaj fine forviŝas larmojn.)

Johano. Kial vi ploras, patrino?

Patrino. Mi ne povas klarigi tion al vi, mia infano, vi ja ne komprenas ĝin. (Rekomencas ŝpini.)

Johano (post momento). Patrino?

Patrino. Kio estas?

Johano. Kial vi ŝpinas la tutan tagon?

Patrino. Tion mi ja klarigis al vi: por ke mi povu aĉeti panon por vi kaj por mi.

Johano. Kial do Alberto ne laboras por ni?

Patrino. Li ja estas soldato, lin bezonas la imperiestro.

Johano. Vi ankaŭ lin bezonas tamen.

Patrino (ĝemas kaj ne respondas).

Johano (post momento). Patrino, ĉu ni devas labori en la ĉielo?

Patrino. Tie ni ĝuos ripozon, mia knabo.

Johano. Ĉu ankaŭ tio estas skribita en la biblio?

Patrino. Jes.

Johano. Kaj ke mi vidos Dion?

Patrino. Jes, mia knabo. Vi vidos Lin!

Johano. Kiam?

Patrino. Kiam vi estos mortinta. Sed ne pensu pri tio, jam laboru!

Fulmas kaj tondras.

Johano (post momento). Ankaŭ, se la fulmo trafus min?

Patrino. Jes, sed la bona Dio malhelpu tion!

Johano. Ankaŭ, se mi falegus de la fumo — sur la ŝtonojn? Sed ili estas tro malmolaj. (Post momento de pripensado.) Ankaŭ, se mi saltus en la riveron?

12. Blinduloj. Aliĝis por la III-a ĝis nun 88 partoprenantoj el 12 landoj. La kongresejo estos la Blindula Instituto. Ĝi faros la eblon por plej malkara gastigado; la senkosta restado dependos de la enirantaj donacoj, sed ne povas esti garantita jam nun.

13. Policanoj. Laŭ interkonsento kun la prov. direktoro de Tutmonda Polica Ligo, la LKK prenis sur sin ankaŭ la lokajn preparojn por tiu ĉi fak-kongreso, kies kunvenoj okazos en la historiaejo de la „majstrokantistoj“ (Katarina preĝejo). La aliĝaj kondiĉoj estas la samaj kiel ĉe la Un. Kongreso. Urba polica patronaro estas starigita, senkostaĵ kuŝejoj disponigitaj. Pluaj detaloj en „Policisto“.

Represo petata.

Loka Kongresa Komitato.

Al la redakcioj de la Esp. gazetoj.

Pro eraro de nia administrejo (la LKK estis senkulpa pri tiu eraro) kelkaj redakcioj ne ricevis regule la specialajn kopiojn de la cirkuleroj. La kopioj de la nova cirkulero estas dissenditaj laŭ antaŭ ĝia publikigo en ET. Redakcioj, kiuj por iu kaŭzo (perdo de poŝto, malĝusta adreso ktp.) ne ricevis kopion, bonvolu tuj postuli ĝin de la administrejo de ET.

La kongresdramo de nia XV-a: Natan la Saĝulo.

De jaroj estiĝis tradicio en niaj Universalaj Kongresoj prezenti al la festanaro Esperantilingve gravan teatraĵon el la literaturo de la kongreslando. Estas do kompreneble, ke ankaŭ la Prepara Komitato de nia XV-a dekomence atentis speciale ilin ĉi aferon kaj ekzamenis zorgeme kaj konscienceme la demandojn por elektit frue vere taŭgan kaj reprezentindan verkon. La germana literaturo estas ja riĉa je belaj dramoj ĉu klasikaj ĉu modernaj. Aliflanke influis la elekton tiom da individuaj, teknikaj kaj financaj vidpunktoj, ke la definitiva decido vere ne estis facila. Kiu ekzemple ne estus aprobinta prezentadon de unu el la kortuŝaj dramoj de Gerhard Hauptmann, kies „Tekstoj“ aŭ „Ĉielenro de Hanjo“ estas ŝatataj en- kaj eksterlande? Sed la aktoraj kaj dialektaj malfacilaĵoj montrigis nesuperigeblaj. El la majstroverkoj de Heibel ni jam posedas bon-egajn Esperantigojn en „Gyges kaj lia ringo“ (Bennemann, Dresden) kaj „Mario Magdaleno“ (Bischitzky, Praha), sed ĉu oni ne riproĉus la

L. K. K.-on poste pro la iom delikata enhavo? La „Iligeno“ de Goethe, tradukita de Zamenhof, estas jam prezentita en nia IV-a; ĉu la refoja prezentado eĉ de tiu majstraĵo ne enuigus la kongresanaron? Wilh. Fricke, Bremen, proponis modelan tradukon de „Kabalo kaj amo“ de Schiller; bedaŭrinde la efika dramo postulas tiom da aktoroj, ke ankaŭ tiu ĉi projekto ne ŝajnis realigebla. Fine, post plurmonata ŝanceliĝado, la L. K. K. decidigis je „Natan la Saĝulo“ de Lessing, Esperantigita de nia lerita samideano Karl Minor, Hamburg, konvinkate certigita per tiu ĉi verko vere belan prezentadon indan je la kongreso.

Gotthold Ephraim Lessing (1728—1781) estas unu el la plej eminentaj germanaj klasikuloj, sam-grava kiel kritikisto, estetikisto kaj dramisto. Krom la unua granda tragedio „Emilia Galotti“ kaj bonega komedio „Minna von Barnhelm“ la germana literaturo dankas al li la plej noblan dramecan poemon, per kiu li esprimis sian personan religian konvinkon. Jen „Natan la Saĝulo“, la alta kanto de homamo kaj toleremo! Elirinte kiel tendenca verko kontraŭ la maltoleremo de sia epoko, ĝi glorias la humanecon la unua postulaĵo de la natura moralteĝo. En tiu ĉi senco Lessing reprezentis la tri monoteismajn religiojn kiel nepre egalvalorajn kaj transmetis la mezepokan scenan agadon al Palestino, kie li povis montri la reprezentantojn de la nomitaj religioj (la kristanan templanon, la mahometanan sultanon Saladin kaj la judon Natan) plej nature unu apud la alia. La religian ideon de la dramo — „la vera religio estas la praktikado de verkfara humaneco“ — simbolas la parablo pri la tri ringoj, kiun rakontas en la tria akto Natan antaŭ la sultano Saladin respondante lian demandon pri la valoro de la religioj. Laŭ tio li viro posedis lam muliekostan ringon, kiu agrabligis sian portanton antaŭ Dio kaj homoj. Ĝi estis heredebla en la familio, kaj ĉiam ricevis ĝin la favorata filo de la patro. Sed ĉar estis samgrade karaj al la lasta posedinto liaj tri filoj, li ne volis preferi unu el ili kaj fabrikigis pro tio du kopiojn de la ringo; sed tiuj ĉi farigis tiom trompe similaj unu al la aliaj, ke la patro mem jam ne ekkonis la modelan ringon. Tiel ankaŭ post la morto de la patro neniu el la filoj scias, kiu posedas la malfalsan ringon. Oni esploras, inkvizicias, oni disputas, oni akuzas: la malfalsa ringo ne estis pruvebla. Fine la juĝisto, kiun ili apelaciis, forsendis ilin admonante pri praktikado de verkfara amo, kiu nur sola karigas antaŭ Dio kaj homoj.

aŭdiĝas sur unu el la pordoj en la fundo. Ŝi iras tien, forŝovas la rigilon kaj malrapide malfermas. Tuj poste ŝi paŝas malantaŭen, surprizite.) Alberto!

Dua sceno.

La Patrino, Johano, Alberto.

Alberto (eniras, rapide fermas kaj riglas la pordon post si). Patrino!

Patrino. Alberto!

(Ili ĉirkaŭbrakas unu la alian.)

Alberto. Vi laboris ankoraŭ, patrino?

Patrino. Mi legis kaj estis enlitiĝonta. (Palpas liajn vestojn.) Kiel malseka vi estas!

Alberto. Jes, mi estas malseka. Pluvas ja torente.

Patrino. Kiel malfrue vi venas, mia knabo, kaj en tia vetero!

Alberto. Jam ne tondras. La malbona vetero pasis, mi pensas.

Patrino (kisantante lin). Ho, kiel mi ĝojas, ĉar vi revenis! (Karesas lin.) Demetu la soldatan mantelon kaj la ĉapon, la akvo elfluas el ili — Pendigu ilin sur la seĝodorso antaŭ la fajroloko, tie ili baldaŭ sekiĝos! Sed viaj botoj — kaj la pantalono estas ankaŭ tiel malseka — Oni pensus, ke vi travadis rivereton, tiel malseka vi estas ĉie.

Alberto. Jes, patrino, mi estas tre malseka; sed tio ne estas grava.

Patrino. Ne grava! Certe, tio estas tre grava. Surmetu tuj aliajn vestojn, viajn proprajn; ili pendas en la ŝranko. (Ŝi iras al la ŝranko.) Alie vi ja malvarmumus.

Alberto. Ne timu, patrino, mi jam ne malvarmumus, neniam plu.

Do, kiel facile rekoneble, la ideo de la dramo turnas sin aktuale al nia batalema, malpacema tempo kaj akomodigbas bonege la atmosferon de niaj kongresoj, kies ĉefprincipoj estas ja de ĉiam religia, nacia kaj socia toleremo. La noblan ideon respondas ankaŭ la klasika stilo kaj lingvo de la verko, kiu certere uzas, la unuan fojon, la kvinpartan jambon en la germana literaturo.

Por plenigi la ĝuadon, la L. K. K. bone atentis ankaŭ pri inda reprezentado. Konsiderante, ke diletantoj ne sufiĉe scias plenumi la rolojn pretendemajn, ĝi engaĝis unuarangajn geaktorojn. La ĉefrolon donos s-o Alfred Richter-Anschütz, ĉefaktoro ĉe la unuigintaj urboteatroj en Chemnitz (Saksujo), dum la ceteraj roloj estas ĉe geartistoj de la fama Nürnberga Urba Teatro en la plej bonaj manoj. Ni ne laŭdu la tagon antaŭ vespero; tamen, se ne ĉio trompas, la prezentado de „Natan“ estos honora tago en nia XV-a.

D-ro Richard Ledermann,
prez. de L. K. K.

VIII-a Internacia Katolika Esperanto-Kongreso Nürnberg.

VIII-a Internacia Kongreso de I. K. U. E.

3-a komuniko.

1. L. O. K. Ĉar bedaŭrinde Rev. D-ro W. Hotzelt, pro gravaj kaŭzoj abdikis sian prezidantecon kaj eksciis el L. O. K., la estraro de I. K. U. E. elektis Lian Pasiran-Muŝon Eklezian Konsilanton Eduard Becker el Breslau prezidanto de L. O. K. Kiel plua komitatano aliĝis Prof. Buckl el Nürnberg.

2. Audienco. Lia Ekscel'enco Moŝto, Eparkia Ĉefepiskopo Alberto von Hauck el Bamberg, bonvolia akcepti favore la du vicprezidantojn de L. O. K. en oficiala audienco. Informinte sin pri la celoj de I. K. U. E., li esprimis sian intereson kaj bonvolon por nia VIII-a kaj promesis, se la cirkonstancoj iel permesos tion, persone ĉeesti almenaŭ unu kunsido.

3. Kofizo. La kofizo restos ankaŭ post 1-a de junio la ĝisnuna, escepte por malbonvalutuloj (aŭstroj, germanoj, hungaroj, poloj, rusoj), kiuj pagos pro senvolorigo de la germana marko 1500 gmk.

4. Aliĝoj. Aliĝis ĝis fino de aprilo 125 gekongresanoj el 7 landoj. Bela areca kongreskarto estas sendpreta.

5. Konferencprogramo. La starigo de la konferencprogramo estas rezervata ekskluzive al la estraro de I. K. U. E. Ĉiuj kongresproponoj estas sendotaj, kiel eble plej rapide almane de ĝenerala sekretario P. A. Schendeler (Eindhoven, Nederlando, Prins Hendrikstraat 30), por ke ili estu ĝustatempe pristudataj kaj irasendataj al la episkopo por aprobo. Ĉiuj prezidantoj kaj sekretarioj estas insiste petataj sendi al la ĝen. sekretario nomaron kaj monon por la ligal membroj, same la individual membroj el Anglio, Belgio, Ĉeĥoslovakio, Danio, Francio, Hungario kaj Palestino, sendi la kofizon por 1925, ĉar alle ili ne povus partopreni la voĉdonadon dum la Ĝenerala Kunveno.

6. Festarangoj: 28-an de julio: Interkonatiga vespero. 29-an de julio: Solena diservo kun prediko de pastro Kozma Solena malferma kunsido, elekto de la estraro, publikigo de la laborprogramo. Komuna festamango. Posttagmeze ekskurso al la ĉarme situanta altejo Schmausenbuck. Vespere propaganda arango por la katolika loĝantaro.

30-an de julio: Diservo por la mortintoj kun prediko de pastro Vioŝ el Pisa (Italio). Unua laborkunsido. Posttagmeze promenado tra la urbo. Vespere preĝeja koncerto en la historia ejo de la Nürnberga maŝinkonstruistoj (katarina preĝejo).

31-an de julio: Dua laborkunsido. Ĝeneralkunveno de la nederlanda Esperantistaro de la akciloj de E. K. U. E. Vizito al la muzeoj. Posttagmeze kaj vespere komuna kunsido en la Urba Parko.

1-an de aŭgusto: Tultaga ekskurso al la ĉefepiskopa rezidejo kaj penirinda Bamberg.

2-an de aŭgusto: Tria laborkunsido kun solena fermo. La oficiala kongresejo estas la Katolika Hospico, ĉefkunveno de la Nürnberga Katolikaro.

7. Donacoj. La L. O. K. ricevis ĝis nun de bonvolaj favorantoj kiel donaco por la kongreskaso entute 7900 gmk., 35500 aŭstr. kr., 1500 hung. kr., 16 1/2 hfl., 9 ĉ kr., 4 liroj, 0,80 flk., 15 pes. Ni dankas kore kaj petas pluan financon subvencio en intereso de bonŝanca kongreso.

8. Loĝigo. Por loĝigi la kongresanojn kiel eble plej oportune, la L. O. K. zorgis pretere pri havigo de senkostaj kaj malmultekostaj privataj loĝoj.

9. Studentoj. Kelkaj junaj studentoj intencas starigi dum la VIII-a Int. Ligon de Katolikaj Studentoj. Tiuj, kiuj

Patrino. La soldatoj kutimigis al malbona vetero. Tamen ŝanĝu la vestojn! Ĉu vi venas permese?

Alberto. Ne. — Jes. — Permeze. (Li pendigas la surtuton sur la seĝodorson, poste li demetas la ceterajn vestojn; dume la Patrino prenas sekajn el la ŝranko kaj donas ilin al li.)

Patrino. Klom da tagoj vi restos? — Jen la sekaj, surmetu ilin tuj kaj sidigu! — Dio, kiel mi ĝojas! Tiel neatendite!

Alberto. Jes, tre neatendite. Kie estas Johano?

Patrino. Vi ankoraŭ ne vidis lin? Li sidas tie en la angulo de la benko ĉe tiu duone plektita korbo. La dormo kapila lin, la kompatindulon.

(Daŭrigota.)

Enigmol.

De M. S. V., Moskva.

1.

Tulo, krik, okno, kamo, para, ŝilo, pero, delo, dni.

En ĉiu el tiuj ĉi rusaj vortoj ŝanĝu unu literon, por kiu ili fariĝas Esperantaj vortoj, kaj la enŝovotaj literoj donos la nomon de rusa verkisto, kiun konas legantoj de ET.

2.

-akto, -amo, -fero, -akso, -rido, -ordo, -paco, -reto, -li, -odo.

Anstataŭigu la streketojn per literoj, por ke vi ricevu novajn Esp. vortojn. La enmetotaj 10 literoj formas la nomon de morlanta rusa Esperantisto (L. K.-ano).

3.

m n m v r - p e i
a e i o k u k r d
Oni legu la literojn de tiu ĉi enigma skribaĵo laŭ difinita maniero por ricevi gravan frazon.

*

La solvoj aperos en venonta numero.

Saluto el Celebes.

En n-o 111 ni jam povis raportii pri fondo de du Esp. grupoj en la Suda Oceano (en Rabaŭl sur insulo Nov-Gineo). Antaŭ kelkaj tagoj atingis nian ĉefredaktoron letero de s-ano pastro Kyffienbelt, kiu nun estas en Menado, ĉefa urbeto de Minahasa lando, kie li fondis Esp. Virinan Klubon de slaj lernantinoj. Minahasa lando estas la nordorienta parto de insulo Celebes, kuŝanta oriente de Borneo, sude de la Filipinaj Insuloj, oriente de la Molukoj kaj de Nov-Gineo kaj norde de la Malgrandaj Sunda-Insuloj Sumbava kaj Flores, preskaŭ sur la ekvatoro.

Jen la ĝoliga letero de pastro Kyffienbelt:

Menado, la 8-an de februaro 1923.

Tre estimata sinjoro!

Dum mia estado en Menado naskiĝis Esperanta Virina Klubo de mlaj lernantinoj. Inter ili estas hinoj, eŭropanoj kaj enlandanoj de Minahasa (la nomo de tiu ĉi landparto).



Pastro Kyffienbelt meze de slaj Esp. lernantinoj en Menado sur insulo Celebes.

Sur la benko aldas de dekstre maldekstren: l-ino Kyffienbelt (filino de la pastro), muzikinstr. Istino; filina instruistino Liem Po Klok Nio; pastro Kyffienbelt; filina instruistino Liem Oh Nio; minahasa instruistino de nederlanda lernejo l-ino Marie Tambajong; minahasa oficistino l-ino Margareta Richter.

La infanoj (nederlandaj kaj minahasaj) estas lernantinoj de nederlandaj lernejoj.

volas kunlabori al tiu ĉi afero, bonvo'u sciigi tiun al la ĝen. sekretario de I. K. U. E.

10. Propagando. Kiu ne aliĝis, aliĝu kaj diskonigu ĉie nian VIII-an. Aliĝiloj laŭdeze haveblaj.

11. Korespondado. Por eviti konfuzojn oni adresu ekskluzive: Katolika Esperanto-Kongreso Nürnberg. Loka Organiza Komitato Johannes Stahl, 1-a vicprezidanto.

Esperanto la sola tutmonda lingvo en jaro 1950.

Antaŭ nelonge mi ekrimarkis en la gazetaro anoncon pri apero de social-ekonomia romano en juda lingvo de L. Korev: „La proksima nov-malnova mondo“, kun rimarko: speciale interesa por Esperantistoj. Mi tuj havigis al mi la libron, kaj kiel mi miris legante sub la titolo-linio jenon: „Transdonita por presi en Esperanto en jaro 1960 kaj en libera juda traduko en jaro 1922“.

Post kelkaj horoj mi finlegis la 236-paĝan interesan fantazian romanon, kiun mi trovis vere interesa por Esperantistoj. Pro tio mi volas doni al la Esperantistaro imagoleton pri ĉi tiu verko priskribanta la proksiman estontan novan mondon.

La aŭtoro transportas nin en meksikan regionon en jaro 1950. Kia ŝanĝo en la mondo en ĉiu rilato, kia progreso! Paco kaj konkordo regas la mondon sub la devizo: „Klopodu fari de via proksimumo bonan amikon.“ Ĉeas militoj, revolucioj, malaperis klasdiferencoj kaj klasbataloj. La homaro formas unu grandegan socion de laboruloj de 17-a ĝis 60-a jaraĝo. Kvin aŭ seshora labortago donas eblecon al ĉiu laboranta homo vivi senzorge, feliĉe kaj libere. Kaj ĉio sen mono, sen oro, sen valoruloj, kiuj

„Marseillaise“ de l' Paco.

Fluu libera kaj belega inter viaj larĝaj bordoj.
Rejno, okcidenta Nilo, pokalo de l' nacioj!
Kaj de l' popoloj trinkantaj viajn vivakvojn
Porportu la verbaŭtojn kaj ambiciojn!

Ne makulos plu vian kristalon ondan
Sango ruĝa de l' franco, blua de l' germano;
Ne defalos plu sub la bruanta keŝtaro
Pontoj, kiujn unu popolo al alla etendas kvazaŭ manoj!
Bomboj kaj obuso, ĉielarko de l' bataloj,
Ne krevos plu sibilante sur viaj bordoj!
Infano ne vidos plu, de sur viaj muroj,
Naĝi senformajn korpajn, pendantajjn intestojn,
Nek levigti el la ondo senvivajn brakojn!

Kial nin malami kaj meti inter la rasoj
Limojn aŭ akvojn malŝategatajn de Dio?
Ĉielan ilmon, ĉu ni lin ajn vidas?
Ĉu ĝia kupolo havas muron, limŝtonon, mezon?
Nacioj! Pompa vorto por esprimi barbarecon!
Ĉu amo haltas, kie haltas viaj paŝoj?
Disŝiru la flagojn! Alla voĉo al vi krias:
Nur egoismo kaj malamo havas patrujon,
Frateco ĝin ne posedas!

Jam ne estas maroj, gradoj, riveroj,
Kiuj limigas heredaĵon inter homaro;
La spirital malvasteco estas ĝiaj solaj limoj;
La mondo vekiĝante aliĝas al unuigo.
Mia patrujo estas ĉie, kie radias Francando,
Kie ĝia genio naskiĝas antaŭ forlogataj okuloj!
Ĉi pensas kaj agas laŭ sia intelekto;
Mi amike kunsentas kun ĉiu animo pensanta:
Vereco, jen mia lando!

Fluu libera kaj reĝa inter ni ĉiuj, ho riverego!
Kaj ne demandu en via fluado fekunda,
Ĉu tiuj de vi portataj aŭ tiuj de vi trinkigataj
Rigardas, ĉe viaj bordoj, orienton aŭ okcidenton!

Laŭ Lamartine, Poeziaj Enpensigoj, 1841.
Libere tradukita L. Lespiciere.

Ĉiusemajne mi donas tri kursojn, unu por la plej grandaj, inter ili instruistinoj de la hina lernejo, unu por la junaj fraŭlinoj kaj unu nur por hinaj infanoj.

Ni ĉiuj preskaŭ 80 Esperantistoj estas fervoraj propagandistoj, kaj ni esperas, ke baldaŭ ĉiu infano en la Minahasa landparto lernu la belan lingvon. Bedaŭrinde ni ne havas sufiĉe da libroj, precipe legolibroj.

Eble la legantoj de via bela ĵurnalo volas helpi min, per sendado de Esperantaj libroj. Kun granda ĝojo kaj kora danko mi ricevos tiujn librojn, ĉar niaj lernantoj ne estas sufiĉe riĉaj por aĉeti librojn.

Via ĵurnalo „Esperanto Triumfonta“ estas granda helpilo, kaj ĉiam ni ricevas ĝin kun granda ĝojo.

Vivu Esperanto, la plej bona ligilo de la homaro! Kun koraj bondeziroj por la sukceso de via ĵurnalo,

via servema samideano

J. W. F. Kyffienbelt,
pastro en Menado (Celebes, Nederlanda Hindujo).

ĉesis esti uzataj. Por la laboro ĉiu ricevas ĉekojn kaj kontrolmarkojn, kiujn eldonas la kontrolbankoj ĉiunonate.

Politike la mondo estas dividita en naci-kaj internaciistoj. Ĉiu ŝtato — konstruita laŭ unu modelo — formas kvadraton de 100 kilometroj en longeco kaj 100 kilometroj en larĝeco. Reprezentanto de l' tuta homaro estas Mondkongreso, kiu decidas ĉion koncerne la socion kaj regulas aferojn interŝtatajn. Interesa estas la manifesto de la unua Mondkongreso, kies dua paragrafo deklaras: „La sola tutmonda oficiala homa lingvo estas Esperanto; ĉiuj homoj, kiuj ankoraŭ ne scias la lingvon, devas ĝin elerni en mallonga tempo; ĉiuj aliaj nacilingvoj estas tolerataj“.

Do tute ne mirige, ke — dank' al la unulingveco en la internaciistoj kaj dulingveco, nacia kaj Esperanto, en naciistoj kaj dank' al la plifaciligilo de l' komunikado per eltrovo de ŝvebmaŝinoj, kiuj per antaŭe neimagebla rapideco transportas vojaĝantojn trans marojn kaj montojn — homoj multe vojaĝadas kaj vizitadas fremdajn ŝtatojn.

Kiel mi jam supre citis, nia romano komenciĝas en la jaro 1950. Je iu bela somera tago sinjoro Nasan Eventov, deputito de la Ciona naciistaro n-o 6, kaj liaj infanoj, filo Amnon kaj filino Tamara, alveturas al la internaciistaro en meksika regiono n-o 47, al lia amiko laboristo-doktoro William Radin. La tuta agado de la romano, de la unua ĝis la lasta paĝo, konsistas nur en komuna vizitado de la gastoj kun familio Radin kaj liaj amikoj al la ŝtatvidindaĵoj, oficejoj, klubejoj, hoteloj, kinoj, teatroj, lernejoj, parlamento ktp. ktp. kaj interesa interparolado, dum kiu ŝoviĝas tra la okuloj de la leganto la tuta konstruo kaj organizo de la „proksima nov-malnova mondo“. Atentigas la leganton la fakto, ke en ĉiuj publikaj lokoj, juĝejoj, infanhejmoj, ŝvebmaŝinoj, kiujn ne preterlasas niaj herooj, oni parolas belan Esperanton. Tre interesa estas la disputo de Miŝel Karaljuŝ, „fervora internaciisto kaj Esperantisto, organizinto de iamaj Esperantokongresoj“ kun la Ciona gastoj, Nasan Eventov, pri la dulingva sistemo en la naciistoj. Post semajna gastado, dum kiu enamiĝis kaj ĝefanciĝis la filo de Nasan Eventov, Amnon, kun la filino de William Radin, Meri, la gastoj forlasas la internaciistaron n-o 47. Jen la lastaj linioj de la miriga romano:

„La sekvintan tagon, je oka horo matene, kunariĝis la tuta familio Radin kun multaj amikoj kun bukedoj kaj diversaj vojaĝdonacoj en la stacidomo por adiaŭ la familion Eventov por ilia forveturo. Nasan Eventov kaj la infanoj kore adiaŭis ĉiujn kaj dankante enkaŝtigis en aerŝvebilon. Ĉe la malfermita fenestro staris Amnon kaj, sin turninte al Meri, diris en hebrea lingvo:

„Kiel dolĉa ĉarma sonoĝo foriris la mallonga tempo kiun mi ĉi-tie pasigis.“

„Ni devas esperi kaj kredi, ke nia estonta vivo, kiam ni volos, estos ankoraŭ pli ĉarma“ — ŝi al li ameme respondis Esperante.

Ekaŭdiĝis signalo. La aerŝvebilo suprenleviĝis je kelkaj metroj kaj en rekta linio forŝvebis.“

La leganto vere pasigas dolĉajn kaj ĉarmajn momentojn legante la libron.

Jam multfoje ni povis trovi menciojn pri Esperanto en nacilingvaj romanoj priskribantaj la estontan vivon. Kaj tute kompreneble, ĉar oni ne povas imagi la estontecon sen unu tutmonda lingvo. Sed la unuan fojon mi trovas libron nacilingvan, kie la aŭtoro direktas la atenton de la leganto al Esperanto en tia grado, kiel tio okazis en „La proksima nov-malnova mondo“. Tiu romano, pro ĝia enhavo, certe estos tradukata en aliajn lingvojn, kaj lianiere faros bonegan propagandon por Esperanto. Se la Esperantema aŭtoro perme-os la tradukon — kio estas verŝajna — kaj troviĝos baldaŭ eldonisto, la Esperantistaro povos legi tiun ĉi romanon ankoraŭ en 1924 ne atendante al jaro 1960, kiam la aŭtoro destinis ĝin — en fantazio — por transdoni al la presmaŝino.

J. Jurysta,
Caestochowa, 1. Aleja, 3.
Pollando.

Ne-literaturaj manuskriptoj.

Publikigotaj.

Popola amuzado en Londono.
La deveno de polurarto.
Instigo al la Dekkvina. (De E. K.)
Ekskursoj en fremdlandon.
Setlemintoj.
Germana spirito, germana koro.
Rimedo kontraŭ laceco.
Pri la fino de l' mondo.

Flugfolieto.

1. Majo.

Kvazaŭ matena krepusko evoluas ŝtato, kiu senfrazo permesas paroli pri homaro. Kio en pasintaj tempoj estis nur idealo kaj dezirindaĵo, komencas fariĝi realaĵo aŭ almenaŭ vidigi distingebajn konturojn. La universala milito ne estas argumento kontraŭ tio, same kiel la „Ligo de Nacioj“ ne estas ankoraŭ ĝia konfirmo; ĉi tiu estas pliĝuste trovebla en la fakto de la monda trafiko kaj de la interpopolaj rilatoj, kiuj tuŝas ĉiun popolon senescepte. Ĉinaj muroj ne povos plu ekzisti en estonta tempo.

Certe inter la homoj ekzistas fosoj kaj profundaj, pro kiuj la animoj ne povas atingi unu la alian; sed, ĉu tiuj baroj estas ĉiam plej profundaj kaj larĝaj inter homoj de malsamaj kultur-rondoj? Ĉu ni ne vidas la samajn barojn interne de la kulturrondo, eĉ de la popolo, al kiu ni apartenas? Tio bazas sur la natura diverseco — aŭ malperfekteco, se vi volas — de ĉio vivanta, eĉ ekzistanta, kaj neniam malaperos.

Aliflanke ni havas ĉie komunajojn, kiuj ebligas interkomprenon kaj interefikon. Kiel la homoj de ĉiuj landoj kaj kulturoj laŭkorpe estas esence egalaj, tiel ankaŭ estas komunaj al ĉiuj normalaj homoj certaj fortoj animaj kaj donoj spiritalaj. Kaj granda kaj ampleksa estas la sumo de ĉi tiuj aferoj komune homaj, kompreneblaj por ĉiu ajn! Al tio, kio estas transigebla de homo al homo, de kulturo al kulturo, kaj jam nun per la monda trafiko efektive ĉien porligas, apartenas ne nur la tuta „ekzakta“ scienco kaj ĝia ideo, la tekniko, sed ankaŭ la arto en ĉiu formo.

Tamen: kiel malgraŭ amikeco eĉ plej intima kaj nobla du amikoj fine restas du malsamaj individuoj ne kunmikseblaj, kun malsamaj sentoj kaj malsamaj koroj, tiel ankaŭ ni ne aspiru realan kunigon de ĉiuj homoj. Ni lasu al iliaj grupoj (gentoj, popoloj, rasoj) ilian individuecon kaj unikecon, per kiuj ili fariĝis tio, kio ili estas. Sed ni serĉu la kunigantajn kvalitojn por frukto-dona interŝanĝo! Tiamaniere ni kreos pli kaj pli altan, valoran vivon, nenion detruante.

Per ni Esperantistoj la problemo homara naturiĝos kaj realiĝos. Ni zorgu, ke tio okazu laŭnature, prudente. Ni ne akcelu revolucion, sed evolucion.

Z.

Sur la tombo de l' Majstro.

Impresoj de l' sesa datreveno.

En tago malluma, malvarma, pluvanta
Ni Majstron venigis al lasta ripoz'...
Ĉi estis ne pluvo, sed gloro kantanta
Ĉin kreis el larmoj angel-virtuoz'!...

Modesta estis la vivo de l' Majstro. Pli ol modesta — lia morto. Kaj ne malpli modestaj la datrevenoj de lia morto.

Vere „en tago malluma, malvarma, pluvanta“ kolektiĝis laŭ la anonco de l' Esperantista Rondo „Konkordo“ en Varsovio la plej fidelaj spirit-filoj de nia neforgesebla Majstro.

Ne estis favora la vetero. La suno ne brilis al ni. Kvazaŭ nekonsoleble ploris la naturo, kaj sub multaj gutoj de pluvo ni staris sur la tombo de nia kara geniulo, honorante lin la sesan fojon post lia morto.

Tiun ĉi fojon la komunikoj en la gazetaro anoncadis jene:

„La Varsovia Esperantista Rondo „Konkordo“ sciligas al ĉiuj varsoviaj samideanoj, ke la ceremonio de l' VI-a datreveno de l' morto de D-ro Zamenhof, aŭtoro de Esperanto, okazos sur la tombo de l' Majstro ne la 14-an de aprilo (ĉar sabate oni ne povas aranĝi iajn ajn kunvenojn sur hebrea tombejo), sed dimanĉon la 15-an de aprilo je la 1 h. pigm.“

Ĝuste je la 1-a horo, antaŭ la tombo ornamita per floroj, kolektiĝis publiko de ĉirkaŭ 150 personoj, al kiuj ekparolis Esperante en la nomo de rondo de amikoj de la Konkordo s-o Bronŝtein, kiu en belegaj vortoj, elvokante plej profundan impreson, karakterigis la grandan kredon de l' Majstro je la venko de l' interhoma amo kaj komparis lin kun Moseo al kiu ne estis destinita eniri la Promesitan Teron. Nur de malproksime li mem havis la feliĉon almenaŭ ĝin ekvidi. Same vi Majstro, per via spirita kred-oku' vidis la triumfon de l' Esperantismo. Sed ni — filoj de Mallibero — certe ne havos la feliĉon ĝisvivi tiun benitan tempon. Ni venadas tial pilgrime por ĉerpadi iom da optimisma kredo, por ne perdi la forton bezonan por plua batalo...

Belega kaj impresiga estis la parolado, finita per deklamo de l' „Preĝo sub la Verda Standardo“.

Post li s-ino E. F. Cense parolis kelkajn bedaŭrovortojn en la nomo de l' franca samideano kaj ĉiuj aliaj Esperantistoj, kiuj ne havas la eblon veni, stari ĉi tie.

Fine pollingve en la nomo de l' estraro de l' Esperantista Rondo „Konkordo“ en Varsovio parolis s-o adv. Jozefo Litauer, kiu prezentis „Konkordon“ kiel plei junan infanon de Esperanto, kiu naskiĝis por celo, kio estis ĉe Zamenhof la kaŭzo por naskigi Esperanton, nome la „Interna Ideo“. En klaraj vortoj li esprimis la esperon, ke post nelonge multaj estos la disĉiploj de Zamenhof, kiuj lernos Esperanton ne nur por scipovi interkompreniĝi, sed ĉar ili estos puŝitaj de l'... Interna Ideo.

Post la paroladoj okazis kelkaj pormemoriaj fotografadoj, kiuj estis finalo de l' ceremonio. Ĉirkaŭ la 3-a horo pigm. ĉiuj disiris.

Edvardo Lonkopolanski.

Progresoj en Ĉeĥoslovakio.

Al Honora Komitato de Ĉsl. Asocio Esp. aliĝis 60 ĉeĥaj eminentuloj, inter ili 3 ministroj, 20 profesoroj de universitatoj kaj teknikaj altlernejoj, verkistoj, artistoj, ĵurnalistoj, membroj de Ĉeĥa Akademio de Sciencoj kaj Artoj, deputitoj kaj senatanoj. — Nombro de la membroj de ĈAE pligrandigis en 1922 je 30%.

La 25. marto 1923 okazis en Praha la IV-a Generala Kunveno de Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista, kiun partoprenis samideanoj el 14 lokoj de la respubliko. El la reprezentitaj raportoj ni citas:

Raporto de s-o Hromada, ĝenerala sekretario, pri la laboroj de ĈAE en la lasta jaro: Asocio aranĝis la I. Kongreson de Esperantistoj el ĈSR kune kun la Ligo de Germanaj Esperantistoj. Rezultato estis fondo de IDR — Internacia Delegitaro Respublika — komitato de 6 personoj preparantaj komunajn entreprenojn de tutregna signifo. — Asocio aranĝis statistikan enketon pri instruado de Esperanto en mezgradaj kaj fakaj lernejoj por prezenti la materialon al la Pedagogia Konferenco en Genève. — Aranĝis paroladon de Prof. Bovet, Dir. de la Pedagogia Instituto J. J. Rousseau, kune kun Filozofia Societo kaj Franca Klubo. — Respondis detalan demandaron de la Ligo de Nacioj pri Esp. movado. — Sukcesis havigi vizan rabaton por partoprenantoj de la kongreso en Helsinko. — Eldonis diversajn flugfoliojn, inter ili tiun de D-ro Kamaryt: L. I. kaj aŭtoritatoj. — Eldonis 3000 ekz de la ĉeĥa traduko de la Raporto pri Esp. en la Ligo de N. kaj dissendis ĝin al ĉiuj personoj eminentaj en la publika vivo. — Starigis Honoran Komitaton por subtenigi la movadon. La rezultatojn ni citis en la titolo. Detaloj estos ankoraŭ sciigataj. — Eldonis ĉeĥan tradukon de Manifesto al instruistaro de la tuta mondo, ktp.

Membrolibro de ĈAE enhavas fine de la lasta jaro 1270 membrojn. Kompare kun la nombro 930 en 1921 ĝi signifas kreskon de 340 novaj, do 30%.

Raporto de s-o Ginz, gvidanto de la Propaganda Sekcio de ĈAE: 176 membroj aliĝis, pleninginte specialan demandaron kaj espriminte konsenton dediĉi unu duonhoron semajne por laboroj de P. S. Krom samideanoj de Praha, 44 membroj kunlaboris konstante. Al ili ni sendis po 78 notoj pri progresoj de Esp. kaj ricevis de ili 265 gazetonumerojn, enhavantaj represon, plue 138 artikolojn pri Esp. kaj 126 notojn pri klubo agado. El ĵurnaloj de Praha krom tio 431 notoj pri progresoj de Esp., entute por 1922 ni ricevis pruvojn pri 960 notoj en 115 gazetoj. Ni ne kalkulas la gazetojn, kies elranĉaĵojn ni ne ricevis. — Ekspozicia materialo migris de unu loko al alia. — P. S. helpis starigi ekspozicion de 105 Esp. gazetoj en la Internacia Ekspozicio Gazetara en Praha, decembro 1922.

Laŭ la raporto de f-ino Vičková, ĈAE kolektis por malsatantaj rusaj samideanoj ĉ. 4000 Kč kaj forsendis por ili 25 paketojn kun manĝaĵoj kaj vestoj. Bedaŭrinde neniu el la ricevintoj informis nin senpere, kaj tiel ni havas sole oficialajn kvitancojn de la Petrograda Grupo.

Laŭ la raporto de D-ro Kamaryt la Ekzamena komisiono de ĈAE kunvenis dufoje kaj donis 2 atestojn pri kapableco instrui kaj 3 pri scio de Esp. — Ekzamena Regularo estas eldonita prese.

Laŭ la raporto de S-ro Novák, kasisto, ĈAE enspezis kotize Kč. 2324.—, donace Kč. 5714.—, profito de teatra prezentado Kč. 1422.—, profito de librovendado Kč. 408.— Preskaŭ ĉion oni eldonis por propagando kaj preso de la broŝuro kaj flugfolioj. Sekve de tio la kunveno post pli longa debato unuanime akceptis la proponon, ke la membroj de ĈAE krom la kotizo pagu unu kronon monate por la propaganda fondo. Per tiu ĉi relative malgranda oferdono ĈAE povus disponi la notindan sumon de 12 000 Kč. jare.

Fine ni citas, ke la kunveno konsentis kun la propono de s-o Hromada: Esprimi al Esperantista Akademio bedaŭron pro tio, ke por la novaj elektoj de LK-anoj la Akademio mem starigis la kandidatan liston por la ĉeĥa lingvo, neniel demandinte opinion de ĈAE. (Hmd.)

Zamenhova memorieto en Olomouc.

La 15-an de aprilo okazis en Olomouc kunsido de nordmoraviaj Esperantistoj kunigita kun memorieto al datreveno de morto de Dr. Zamenhof. Partoprenis ĝin gesamideanoj el Bystřice p. H., Odřice, Přerov, Prostějov, gastej el Brno, Jägerndorf, Praha. Saluleterojn sendis el Praha s-o Hromada, s-ino Šupichová, Holešová, Bystřice. Antaŭtagmeze okazis propaganda parolado kaj labor-kunsido, posttagmeze Esperanta akademio en ĉambrego de Y. M. C. A. Post 9 h. malfermis prez. de Olom. Esp. Societo s-o Kudela la kunsidon, bonveninte la ĉeĥistinojn kaj klariginte ĝian celon kaj signifon. S-o prof. Friedrich el Brno surprizis la aŭskultantaron per granda kvanto da tre valoraj materialoj, kiuj forigis ĉiun dubon kaj skeptikecon kontraŭ Esperanto kaj ĝia uzado en internacia rilato. Li diris ankaŭ pri la profitoj, kiujn liveras al ni UEA per siaj servoj kaj la scio de tiu ĉi lingvo entute. Post li paroladis fervola ĉefkonsilanto s-o Barvíř el Brno, reveninta ĵus de venezia konferenco, kies novaĵoj estis akceptataj kun granda entuziasmo.

La laboran kunsidon prezidis s-o Kudela, protokolis s-o Neuzil. Diskutataj estis la ĝisnuna sukcesoj kaj spertoj akiritaj dum propagando kaj instruado, la vojoj irotaj kaj evitotaj speciale ĉe publiko kaj gazetaro ne simpatianta kun nia ideo. La diskuto partoprenis s-inoj Havráňková, Moudrá, s-oj Friedrich, Horn, Malik, Procházka, Barvíř k. a. S-o Procházka surprizis la ĉeĥistinojn per Esp. kantoj kaj recitaĵoj de siaj tri lernantoj. La venontan kunsidon de nordmoraviaj Esperantistoj oni decidis okazigi en Přerov.

Menciinde estas, ke la garnizona komando en sia ordo rekompensis al soldatoj kaj oficiroj la partoprenon de parolado kaj akademio, kion riĉelis la regim restroj en siaj tagordonoj.

Tute alie kondukis la ankaŭ invitiitaj direktoroj kaj profesoroj de ĉiuj mezaltlernejoj ĉeĥaj, nek vizitinte niajn arangojn nek rekomendinte ilin al siaj lernantoj. Oni devas miri, ke ankoraŭ tio multe de kleraj personoj, kiuj en siaj klerigaj paroladoj sciis ĉiuj la grandajn meritojn de naciaj genioj, silentas pro la kaŭzoj pri la ideo de tia geniujo J. A. Komenský (Comenius), kiu jam en la jaro 1641 revis pri kreo de helpa internacia mondlingvo en sia verko „Via lucis“. Ankaŭ la sentenco de respublika prez. Dr. T. G. Masaryk (80. 3. 1903) „konsiligi al ni nian grandan mondaskon, provi la daŭrigon de grandaj ideoj de niaj patroj kaj kunsolvadon kun nacioj plej progresintaj en ĉiuj urĝaj problemoj de moderna homo“, — ne ŝajnas esti al ili sufiĉe aktuala koncerne la neŭtralan internacian mondan helplingvon ĝuste en la tempo, kiam sendrata telefonio, telegrafo kaj aviado komencas forigadi la nacian landlimon.

Je 14 h. estis malfermata per forteplaniado kaj horkantado de E.-p. himno la akademio, post kio s-o Kudela en sia parolado esprimis dankemon al nia granda genio Dr. Zamenhof, fidelecon al lia grandioza verko, al la interna ideo de Esperantismo kaj ke oni plej taŭge honoros lin per faktoj, ke lia verko vivu kapable estas. Precipe tre plaĉis „Bonvenon“, recitaĵo de 7-jara Eislerová, „Nova penso“ de Esperantista Leo Šmidlová, „Lernanta rezonado“ de du lernantinoj de s-o Neuzil, kiu prave povas fieri pri la sukcesoj en sia lernejo. Ne malpli plaĉis la kantoj de f-ino Klementová, komponata forieplane de eminenta muzikistino f-ino Havráňková. La ceteran muzikan parton prizorgis unuaklasaj muzikistoj s-oj D-ro Matura kaj Hub. La teatraĵo „Flandiĝo de Sovagulineto“ ludita de f-inoj Rabi, Kudelová, Hořková, Chlebavová, s-ino Eislerová, s-oj Chromec, Malacka kaj Neuzil tre plaĉis dank' al la fervora regisoro s-o Eisler, ankaŭ al ĉeĥistinoj ne-Esperantistoj. Ĉeestis 180 p. Pluĝustan ornamon de ĉambrego prizorgis vicprez. s-o Wolf. Al ĉiuj, kiuj kiel ajn helpis al tiu bela sukceso, koran dankon. A. K.

Interesa konvertiĝo.

En la jaro 1920, dum mia porpropaganda restado en Targu-Mureș (Transilvanio, Rumanio) foje mi faris viziton al la direktoro de la ŝtata liceo por preparoli la eblecon de kurso aranĝota por la lernantaro. Varme min akceptinte, la simpatianta direktoro promesis plenan helpon, kaj tuj petis la necesan permeson de la Regiona Direktejo de la Duagrada Instruado en Cluj. Post du semajnoj mi refoje vizitis por sciigi pri la permeso. Min jam atendis malvarma akcepto kaj senkondiĉa rifuzo, ĉar la respondo de la Reg. Direktejo estis tute malfavora, eĉ kondamna.

En februaro nunjara s-ano A. Babos, prof. en Targu-Mureș, petis permeson de la sama Direktejo, por instrui Esperanton en unu leciono posemajna, ĉe la ŝtata mezlernejo. La respondo enhavis ne nur simplan permeson, sed ankaŭ surprizan insligon por doni du lecionojn semajne, ĉar unu ne sufiĉas.

Interesa fakto estas, ke la aŭtoro de ambaŭ decidoj estas la sama persono de s-o Prof. Gh. Cornea, intertempe konvertita per hazarda aŭskulto al Esp. konversacio en teatra koridoro. Nun li jam estas sindone fervora batalanto por la afero de Esperanto kaj ni, iamaj malamikoj, kune faris propagandajn paroladojn en Timișoara, okaze de l' Esperanto-tago, la 14-an de marto nunjara. Andreo Ĉe.

Mallongaj Esp. Sciigoj.

Britujo.

La 59-a Kvaronjara Konferenco de la Federacio Esperantista de Lancashire kaj Cheshire okazis en la urbdomo, Leigh, Lancashire, sabato, 21. aprilo. Ĉirkaŭ sepdek Federaciianoj ĉeestis. D-ro J. Jones, prez. de la loka grupo, akceptis la vizitantojn, kaj la urbestro, Konsilanto W. Collier, malfermis la kunsidon. Lia Moŝto diris, ke li vere kredas la celojn de Esperanto, ankaŭ ke la pasintaj jaroj ekzemplis, kiel nacioj dependas unu de la alia por ke ili vivu, kaj la plej bona metodo fratiigi la homaron, estas, ke Esperanto estu instruata en ĉiuj lernejoj tra la tuta mondo.

La prezidanto de la federacio, s-o Wright el Manchester, proponis voĉdankon al la urbestro, kaj s-o Horsley el Manchester lin subtenis.

Post tio Prof. Collinson, M. A., Ph. D., de la Universitato de Liverpool, faris propagandan paroladon rilate al Esperanto kaj instruado. Li diris unue, ke Prof. Gilbert Murray kaj Lord Robert Cecil aprobas Esperanton, kaj ankaŭ, ke ni ne volas, ke homoj lernu Esperanton simple kiel lingvon, sed por ke ni pli bone komprenu unu la alian, per la rekta tusaĵo rilate al la valoro de Esperanto en la antaŭenigo de la sciigo de moderna gramatiko, la Profesoro diris, ke la lingvo estas tiel malkonfuza, ke infanoj povas kompreni pli facile la gramatikon de la lando per la helpo de Esperanto.

La federaciianoj temangis ĉe la Parish Church Institute, kaj poste geknaboj de lernejoj en Leigh aktois kaj kantis Esperante kaj angle. Poste sekvis dancado. (J. J.)

Ĉe Londona Esp. Klubo okazis la 7. aprilo „Imita Proceso“ gvidata de s-o Jackson Coleman, advokato, kiu ludis la rolon de juĝisto. La proceso temis pri tio, ke iu sinjoro sendis edziĝproponon al fratilino ne skribante sian antaŭnomon. Okazis, ke ŝia ĝemel-fratino, kun kiu ŝi loĝis, malfermis la leteron, kredante, ke ĝi estas por ŝi. Ŝi skribis al la sinjoro kaj akceptis la proponon. Kiam la sinjoro ekacis la eraron, li kompreneble rifuzis edziĝi kun ŝi. Sekve ŝi provis kontraŭ li pro malplenumo de edziĝpromeso. La verdikto favoris ŝin. (E. Read.)

„Miaj Rememoroj pri la Unua Esp. Internacia Kongreso“ estis la temo de D-ro Buchanan ĉe Dimanca Rondo en London la 22. aprilo. Li estas unu el la malmultaj ankoraŭ vivantaj ĉeestintoj de la plej grava el ĉiuj Esp. kongresoj, kaj lia mirinda priskribo pri ĝi kreis en ĉiuj aŭskultantoj fortan deziron ĉeesti internacian kongreson por vere sperti, kion spertis li en la „Unua“. (E. R.)

Bulgarujo.

En Plovdiv s-o Kostadin Mateev gvidas kurson por diversprofesuloj kaj s-o Malcev alian por junaj urbanoj kaj lernantoj; en ambaŭ kursoj ĉ. 40 p. — La 18. 3. sekve de invito de Direktoro de Franca Lernejo en Plovdiv, s-o Privat, gimn. Esp. lektoro Penko Stoev paroladis pri nuna stato de Esp., antaŭ 260-ano de nomita lernejo. — La 18. 4. trapasis la urbon Prof. Dr. Jos. Longo el Mödling apud Vien, konata bontemplano kaj Esperantisto. (P. S.)

Germanujo.

La movado inter laboristoj.

Lab. grupo Bitterfeld finis kurson kun 11 p. (komence 21 p.). — Kurso en naibara Holzwesaisig finigis kun 7 p. (komence 17), kiuj lo-dis novan grupon. Novaj kursoj komenciĝis en Bitterfeld kun 12 p., Holzwesaisig 30 p., Sandersdorf 15 p. kaj Jessnitz 10 p.

Lab. grupo Breslau komencis kurson kun pli ol 40 p. — La kleriga komitato de la laboristaro de Breslau aranĝis du kursojn, gvid. k-do Dr. Levy.

Lab. grupo Dinslaken-Lohberg komencis kurson la 15. 4.

Nova lab. grupo fondiĝis la 2. 4. en Oberlungwitz.

Hispanujo.

En Baracaldo okazis 2 kursoj pasintan vintron, unu por infanoj, alia por plenkreskuloj. Nun okazas unu kurso ĉe la Salesiana Kolegio (partoprenas 3 salesianoj kaj 5 ekslernantoj) kaj alia ĉe la Tradicia Societo kun 12 p. Festo kun teatra prezentado baldaŭ finigos la kursojn. E. L.

Hungarujo.

Kantistara Esp. Festo en Budapest. La 15. aprilo estis en granda ĉambrego de Budapest sukcesa festkoncerto de la Laborista Esp. Floro kun partopreno de aliaj laboristaj horoj, kiuj hungarlingve kantis, kaj kelkaj artistoj muzikaj kaj deklamaj. Post la koncerto estis danco.

Progreso de la Laboristaro Esperantista. La Hungara Laboristaro fondis jam la dekan grupon. Ĝi estas en Rákospalota, laborista antaŭurbo de Budapest, kie ĝi la 21. 4. aranĝis bonsukcesan kabaredfeston kun danco. Jara kunveno de la Hungarlanda Esp. Societo okazis la 22. aprilo en Socia Muzeo. Ĉeestis 50 personoj. Progreson montris la grupo de Pécs, kie okazos dum pentekosto la landa kongreso. Kelkaj grupoj plendas pri ekonomia krizo. La ĝenerala raporto ankaŭ montris, ke la multkosteco kaj malaltaj salajroj nebligas al plej granda parto de inteligentularo Esperantista aŭ al tiuj, kiuj emas esti Esperantistoj, oferi ion al la movado kaj pagi la malmaltan kolizon societan. La societo tamen laboras, kaj ĝia instituto jam eldonis novajn librojn. Oni elektis por nova sekretario la subprezidenton de la Hungara Esp. Instituto: Deon V. Tóth kaj Dron J. Takács. Notario farigis denove s-o Kirschner. La aliaj estraranoj restis la samaj. Oni memoris la ĵus mortintan plej malnovan samideaninon: Zipernovszky. (Resto de la raporto nelegebla.)

Kanado.

En Montreal s-o Bardorf faris diversajn paroladojn pri Esp. Nova kurso kun 12 p.

Sudslavujo.

Janjina (Dalmacio). — La Esp. Klubo, kiu jam kreskis de 6 al pli ol 80 membroj, malfermis la 1. 4. kurson kun 25 p. (inter ili kelkaj instruistinoj). Klubkunvenoj ĉiueespere de 8.—10. h. Animo de la klubo estas la prez. D. Baselli. Li donis al sia filo nomon „Espero“, eble la unua Esp. nomo en Dalmacio. S-ano Stjepo Ferri el Trpanj faris kelkajn bone sukcesintajn paroladojn en Janjina.

(Elĉerpaĵo el detala raporto de s-ano Ante Marinović)

Svedujo.

La Esp. Klubo de Göteborg gvidas dum 1922 tri kursojn, el kiuj unu por komencantoj, lu klubano gvidis kurson de laborista studrondo en Hisingen.

En Örebro fondiĝis grupo: prez. Oskar Johansson.

Usono.

La grupo de Boston gvidas novan klason kun pli ol 20 p. Prof. Louis Lambert, gvidanto de Berlitz School en Boston, malfermis kurson.

Prof. Hetzell en Philadelphia radioparoladis la 24. 2. pri „Esperanto en Radio-komunikado“.

En Clinton, ŝtato Iowa, prof. Knappe gvidas kurson kun 12 lunoj.

En Newport News, ŝtato Virginio, studentoj de la Internacia Biblio lernas Esperanton.

La urbo Topeka, ŝtato Kansas, donacis 15 dolarojn por aĉeti Esp. librojn.

Esperanto vivas.

Plaueu, 27. 4. — Hodiaŭ mi estis devigita atendi en la ĉi tiea stacidomo ĉirkaŭ du horojn aŭrojo al la ĉeĥa landlimo. Mi alparolis policiston sur la persono, demandante informon pri la loka Esp. movado kaj ĉu ili scias la adreson de la UEA-delegito. Imagu mian agraban surprizon, kiam mi ricevis respondon al mia ĝermanlingva demando en flua Esperanto. — Enirante la vagonaron, mi estis demandata de knabo vendanta oranĝojn kaj ĉokoladon kaj ekvidinta mian aĉeton: „Ĉu vi estas Esperantisto?“ Mi preskaŭ pensis, ke mi enfalis en la kongresan urbon. Li sukcesis vendi al mi ĉokoladon citante la prezojn en Esperanto. Ni interŝanĝis adresojn kaj adiaŭis unu la alian post agraba interparolo. — Kaj la mondo volas scii, ĉu Esperanto estas jam bone disvastigita. J. D. Applebaum el Liverpool.

La internacia ligo de militviktimoj

akceptis dum sia liga kongreso en Ilmenau (Germ.) aĉkvantan urĝan proponon de la loka grupo Berlin-Schöneberg. „La internacia helplingvo Esperanto estu akceptata de la Internacia Ligo kiel komunika lingvo kun la frataj organizoj de aliaj landoj. Delegitoj al internacia kongreso devas scipovi Esperanton.“

Komerco.

Komercaj ĉambroj partoprenintaj en Venezio.

Entute 78. El la diversaj landoj: Italujo 29, Francujo 10, Rumanujo 9, Ĉ.-Slovakujo 6, Svisujo 5, Ĉinujo 4, Britujo 3, Hispanujo 3, Nederlando 2, Germanujo 2, Belgujo 1, Meksikujo 1, Usono 1, Hungarujo 1.

La nunjara Printempa Foiro de Budapest malfermiĝos la 19. majo en la Industria Halo de Budapest; ĝi estos grandmezura ekspozicio de la hungara industrio, ĉefe agrikultura, por konigi ĝin al la hungara publiko kaj al la eksterlandaj reprezentantoj. La Foiro disponigis apartan lokon por Esperanto, kie oni senpaga elmetos komercajn kaj turismajn reklamojn kaj afiŝojn en Esperanto. Samideanoj bonvolu konigi tiun scilgon per naciaj gazetoj kaj sendi po du ekzempleroj al s-o Paul Balkanyi en Budapest VI, Hajos-u. 15. Reklamiloj, afiŝoj ktp. por disdoni kaj elmeti dum la foiro estu sendataj al la sama adreso.

Telegrafio.

La Demokrata Semajno en Paris por Esperanto.

La 25. aprilo la Demokrata Semajno pri Poŝtoj, Telegrafoj kaj Telefonio, kunveninta en la Konservatorio de Artoj kaj Metioj en Paris, sub la prezido de s-o Borel, membro de la Scienca Akademio, unuvoĉe voĉdonis favore al Esperanto, kiel klara telegrafa lingvo.

Socialistoj, atentul

Ĉiuj vi scias, kiom grava afero prepariĝas en Hamburg. Multe ni jam klopodis por havigi al niaj kamaradoj la tiom bezonatan internacian sinligebilon, la internacian lingvon. „Cent semoj perdiĝis, mil semoj perdiĝis.“ Ĉu tiu ĉi okazo de l' Internacia Socialista Laborista Kongreso ne finis estu la milunua semo, kiu ne perdiĝos? Multego da fidelaj, paciencegaj homamantaj pioniroj inter ni, aplikis sennombrajn penojn, senlace laborante dum jaroj por tiu

celo. Ili „pacience eltenis“, apogitaj per la espero, ke iam la tamen venos la momento, ke iliaj penoj donos la frukton. Ni uzu la nunan momenton! Ĉesu la paroloj pri kaj komencu la agoj per Esperanto!

La delegitoj, kiuj kunvenos en Hamburg la 21. majo 1925, intertraktos pri „la internacia batalo kontraŭ la internacia reakcio.“ (2-a punkto de l' provizora tagordo) kaj pri „la organizo de l' internacia proletararo“ (4-a punkto). Ĉu vi, Esp. laboristoj, povus imagi delegitaron de kamaradoj tutmondaj, traktantaj tiun problemojn — sen Esperanto? Kaj, se tio okazus, ĉu via koro ne dolorus poste, kiam vi legus la kongresraporton? Ĉu ne sufiĉas, ke la kongreso mem ne jam laŭ la vera senco de internacieco povos okazi per Esperanto? Ĉu ne la neceso agi por la lingvo, urĝe sin trudas al ĉiu intereso? Do, ĝi agi!

Vi ĉiuj ofte jam spertis, ke oficialuloj al vi propagandantoj ridetante respondis, ke la lingva afero ne estas ĝis nun sufiĉe maturiĝinta, tio estas, ke ne ekzistas sufiĉa nombro da samlingvanoj inter ni, do, ke oni ankoraŭ devas praktikadi la interkompreniĝon per interpretistoj. Evidentigo do al la kongreso la nepravecon de tiu aserto! Ĉiu, ĉu en la nomo de grupo ĉu — estante izolulo — sole en propra nomo, skribu tuj al la kongreso, pruvante per tio, ke en ĉiuj landoj jam ekzistas sufiĉaj Esperantistoj. Ke izolaj Esperantistoj Esperantistigu la milionaron de niaj kamaradoj sen subteno de niaj grandaj organizoj, tion eĉ ĉi tiuj ne povos postuli. Kion izoluloj povas fari, ili jam faris, nome prepari la kampon. Nun la organizoj agi! Menciui al ili tion!

El ĉiuj ventodirektoj alflugi al la kongreso viaj salutoj, bondeziroj kaj viaj — postuloj. Ĉiuj al la kongreso faktajn pri la taŭgeco kaj valoro (Geneva Konferenco), pri la uzebleco ankaŭ per neinstruituloj (servoj, korespondado), pri kongresdecidoj (ĝeneralej kaj speciale, precipe socialistaj).

Certe estus rekomendinde, certigi al si la kunlaboron de kongrespartoprenantoj, sed, se Esperantistoj ĉeestus hazarde inter la delegitoj, ili ja mem scios, kion ili faru; kaj se ne, jam la alskribajoj en Esperanto pri al mem atentigos la kongreson. Kaj se la kongreso nenion alian faros, ol kion multaj aliaj korporacioj jam estas farintaj, nome „studigi la aferon per aparta komisiono“, tio jam estos p-ŝto, kio ne okazus, se vi ne skribus. Rikado do postmarkon kaj leterpapteron, kiuj neniom valoras kompare al la alta celo, jam por tio, por ke la samideanoj en Hamburg demandontaj pri Esp. alskribajoj ĉe la sekretario de la kongreso ne vane demandu. Kaj ankaŭ por tio skribu, ke en estonta tempo vi ne peniu, ke vi eĉ ne iomete agis.

Adreso: Internacia Socialista Laborista Kongreso, Hamburg, Gewerkschaftshaus, Besenbinderhof 57, Germanio. Kamaradoj en Wien.

Internacia Sporto.

Boksado.

Breitensträßer gajnis en la 7-a rondo kontraŭ Wagener la pezulan majstrecon de Germanlando.

Ĉevalkonkuro.

Dum brulo en la staloj de s-o Berry Sinclair en Jorstown (New Jersey) brulmortis 60 konkurĉevaloj, kiel valoro estis duona miliono da dolaroj.

Olimpiado.

La internacia komitato por la Olimpiaj Ludoj kunveninta en Roma decidis rifuzi la partoprenon de Germanujo, sed permesi la partoprenon de Aŭstrio en la venonta Olimpiado okazonta en Paris.

Piedpilko.

La piedpilka klubo de Nürnberg ludos de 8.—13. 5. en Hispanujo.

En Ĉeĥoslovakio ludis unuan fojon post 25 jaroj Slavia Praha kontraŭ D.F.C. (germana pp. klubo) Praha. Rezultato 2:1 por Slavia.

Svislando kontraŭ Francujo en Paris 2:2. Du ludojn de Leipzig kaj Zürich en Svislando gajnis Zürich per 4:2 kaj 3:1.

Gazetaro.

Berner Tagblatt, 21. 5. Parolado en la komerca kaj industria unuigo pri Esp. kaj ldo.

Der Bund, Bern, 8. 4. Venezia.

France-Europe-Orient, Paris, 15. 4. Grava komerca revuo.

Enhavas dupeĝan Esp. parton kun artikoloj en lingvoj franca kaj Esperanta. Bedaŭrinde la Esp. parto enhavas multajn preserarojn.

La Ceravane, eldonata de nia s-ano prof. Rol en Caillac-sur-Tarn, aprilo. Kun aldono „L' Esperantisme“.

La Dernière Heure, Bruxelles, 17. 3. Pri Venezia.

La Province, Mons, 22. 4. Pri Venezia.

L' Employé, Bruxelles, 15. 4. Art. „Esperanto“.

O Seculo, Lisboa, 12. 4. Esp. en Brazilio.

Volksstimme, Magdeburg, 29. 4. Noteto pri Esp.

Die Rote Fahne, Wien, 24. 4. Art. „La vojo al komunismo“

en lingvoj Esperanta kaj germana.

Sozialdemokrat, Prag, 4. 4. Pri Nürnberg.

Reichenberger Zeitung, 10. 4. Noto pri Venezia. 14. 4.

Detala art. pri Venezia.

Rigaasche Nachrichten, 24. 4. Esp. kaj polico.

Jurnalni List, Zagreb, 22. 4. Preakaŭ tutaĝa art. pri: „Esp.

intern. kom. lingvo; Konferenco en Venezia; Folioj kaj

Esp.“

Korektoj.

Akademio kaj L. K.

Ni bedaŭras, ke — pro eraro — la lasta frazo de la artikolo „Akademio kaj L. K.“ en n-o 185 donas tute malkustatan sencoon. Oni bonvolu legi:

„59 L. K.-anoj voĉdonis; tre malmultaj (preskaŭ ĉiuj el malproksimaj landoj) ne voĉdonis (14).“

Konsiderante, ke la nuna nombro de la L. K.-anoj estas 75, ke 59 (poste pli ol 2) voĉdonis, kaj ke la nevoĉdonintoj preskaŭ ĉiuj loĝas en malproksimaj landoj, oni povas nomi la rezulton de la voĉdonado eĉ bonega.

Literatura Mondo.

La eldonejo de „L. M.“ petas nin korekti, ke „Literatura Mondo“ estas eldonata ne de la libroeldonejo „Kultura“, sed de ĉi-okaza societo altruista, kiu havas kontrakton kun la plej fama hungara pres-instituto „Globus“.

Konferenco de Venezia.

S-o Baudet ne estas profesoro sed instruisto kaj ne prezidanto de la Administra Konsilantaro de la Komerca Instruado sed nur de unu komerca lernejo. S-o Ravizza ne estas komandanto sed komandoro, la italoj ĉiam metas antaŭ la nomo la rangon de la ordeno, kiun oni havas.

Leterkesto de ET.

G. M. en Marseille. Dankon pro atentinda letero kaj manuskriptoj. „Rekordoj“ baldaŭ aperos. Pri la ceteraj ni decidis poste.

F. Cesa-imi. Manuskriptoj bone alvenis kaj aperos iom post iom. Dankon! Manuskriptojn bv. skribi nur

Diversaĵoj.

La situacio de la bulgaraj oficistoj.

Mi ne kredas, ke ekzistas la mondo ŝtataj oficistoj pli mizere salajrataj ol la bulgaraj. La plimulto havas kelkmembran familion kaj faras kontraŭ la ĉiam plikariĝanta vivo heroan kaj mal-esperan batalon. Escepte de tre malgranda nombro inter ili, privilegitaĵoj de la sorto, kiuj havas sian dometon, konstruitan helpe de pruntoj antaŭ la milito, la ŝtataj kaj publikaj oficistoj bulgaraj ne povas sin nutri nek vesti konvene. Efektive, la salajro de multaj sufiĉas laŭvorte apenaŭ por la ĉiutaga pano de ilia familio.

Ministro, kiu en 1912 ricevis salajron de 15 000 levoj (15 000 sviz. fk.) jare, ricevas hodiaŭ 136 000 levoj (4550 sviz. fk.) laŭ la monkurzo aŭ apenaŭ 30 % de sia salajro de 1912. La prezidanto de la kasacia kortumo, la ĝenerala direktoro de la fervojoj kaj aliaj altrangaj oficistoj, kiuj en 1912 ricevis salajrojn egalajn al 9000 sviz. fk. jare, ricevas hodiaŭ nur — ink'uzive ĉiuj aldonoj pro la vivkareco — en levoj sumon de ĉ. 1800 sviz. fk. jare aŭ 19 % de sia antaŭmilita salajro. Universitata profesoro ricevas 1400 sviz. fk. aŭ 20 % de tio, kion li ricevis en 1912. Oficela knabo ricevas nun 356 sviz. fk. jare aŭ 35 % de la kutima salajro en 1912.

La nunaj salajroj de la publikaj oficistoj atingis, en paperaj levoj, por la superaj oficistoj la kvin- ĝis sesoblon de la salajroj en 1912, kaj por la malsuperaj oficistoj la dekoblon, sed la vivo plikariĝis dudek- ĝis tridekoble. Pro tiu ĉi mizera situacio la agoj de malespero plimultiĝas.

Estus interese, se aliaj samideanoj farus similan malgrandan komparon inter la salajroj de 1912 kaj 1923 kaj la nuna plikariĝo de la vivo.

iv. H. Krestanoff.

Memhelpo.

Ankaŭ la mizero ofte donas bonajn fruktojn. Ekzemple ĝi igas la homojn eltrovemaĵoj kaj faras el knaboj — kajerofabrikantojn. En Germanujo nuntempe unu skribkajero el la simpla papero kostas 300 mk., el papero pli bonkvalita eĉ 400 mk. Teruro ekkaptas la familestrojn, se li devas aĉeti ĉiusepacajn kajerojn por siaj lernantaj infanoj. Jen — unu el la instruistaro de Potsdam (urbo proksime de Berlino) montris al la junularo la vojon de memhelpo, kaj nun lernantoj el diversaj lernejoj de la urbo ĉiutage manlaboras, ke ĉiu observanto sentas veran ĝojon en la koro. Ili tranĉas paperon, ordigas ĝin, bindas kaj gluas, gvidataj de profesia librobindisto, kaj estas ĝuo alrigardi, kiel gaje kaj diligente la knaboj laboras, tiamaniere subtenante la kason de la gepatroj. Vi, kara leganto, certe demandas, pro kio mi raportas pri tiu okazajo! Nu, ĉar eble krom Germanujo ekzistas aliaj landoj malbonvalutaj, kiuj ankaŭ ŝatas profitigan memhelpon. Por la instruistoj la supra sciĝo estu instigo al sama agado, ĉar la estanta epoko celas gvidi la ĝeneralajn per manlaborado ne nur al teknika lernejo, sed precipe vekli en ili intereson por la laboro kaj spiritan komprenon de la vivbezonoj.

E. Markau.

Parolejo.

172. „Buĝeto“ aŭ „budĝeto“.

En la ĵus ricevita numero de ET mi rimarkas kelkajn notojn pri vortoj en la Oficiala Radikaro. Speciale aliris mian atenton la vorto „budĝeto“. Prof. Grosjean Maupin diras:

1. Pri „buĝeto“ — „ĝi estas nerekoniebla por la plejmulto.“

2. Pri „budĝeto“ — „ĝi ne estas ĝuste elparolebla. Tion oni devas konfesi.“

1. Mi bedaŭrinde povas paroli nur de angla vidpunkto, sed mi ŝatus demandi, ĉu la unua formo ne estas pli rekoniebla ol, ekzemple, „kolero“, „vualo“, „odekolono“, „filizo“, „fojo“, „ekstera“? Ĉiu el tiuj vortoj konformas al la Esperanta fonetiko kiel devus ĉiu internacia vorto.

2. La enkonduko de la dua formo malfermas vojon al tiaj neparoleblaj vortoj kiuj uzas la finlandanojn — „finna“, „sejtementa“. Kial ne estas vortoj en nia lingvo — „ĝemello“, „pommo“, „letero“, aŭ „fihizo“, kiuj, mi estas certa, estus pli rekonieblaj ol la kuilmaĵ formoj, tamen elmiŝe parolendaj?

Mi esperas, ke la L. K. rekonosderos la oficialigon de la formo „budĝeto“. En la okazo, ke la pesilo ankoraŭ balancas, mi aldonas al mia argumento por „buĝeto“ tiun de ĝia simpla; ĝi estas pli mallonga. Malpeza argumento, sed eĉ ĉi haro pezas en bona pesilo.

H. W. Smith, London.

*) Supran artikolojn ni devas prokresiti pro manko de loko. Intertempe la L. K. decidigita por la formo „budĝeto“.

Anoncetoj.

MORTO. — La 31. marto mortis pro flizo 27-jara samideano August Tenneberg, bona Esperantisto kaj abonanto de ET, en Tallinn (Estonujo).

MORTO. — La 12. aprilo mortis subite en Tallinn samideano Johannes Saar en aĝo de 40 jaroj.

KIU SAMIDEANO helpas junan germanan kompoziston trovi pozicion en eksterlando. Leteroj aŭ „R. K.“ al la administracio de ET.

JUNA FINNLANDA STUDENTO serĉas en Nürnberg amikan familion, ĉe kiu li povas loĝi dum la XV-a, kaj amikojn, kiujn li vizitos post la kongreso, en Nürnberg, Lyon, Barcelona, Sabadell, Dresden kaj Berlin. S-o Heikki Hietel, Pietarinkatu 18. C. en Helsinki (Finlando).

BILDO DE NÜRNBERGO, aliaj antikvaj urboj, Alpoj, aliaj montaroj, kasteloj, pejzaĝoj ktp. orig. fotoj nun 9 (anat. 6) kontraŭ 2 skand. kr. 2 av. fr. 2 šil., 5 fr. aŭ belg. fr. aŭ egalvaloraĵ monbiletoj. H. W. Manske, en Berlin — Schmargendorf, Brelesir. 4.

POR LA II-a KONFERENCIO de ALL (Aŭstria Laboristo Ligo) okazonta en majo, ni petas sendi ekspozician materialon. Eksterlandanoj sendu almenaŭ il. pk. por ke ni povu prui, ke niaj lingvo kaj ideo disvastiĝis tra la tuta mondo! Adr.: Aŭstria Esperanto-Oficejo de ALL en Linz a. D. Landsir. 36.

KORESPONDVESPERO aranĝota la 16. majo 1923 en propaganda celo. Samideanoj sendu al ni let. kaj il. pk. Adreso: Logen Svenske. Ordenshuset, en Sundsvall (Sved).

SENDU VIAN PRECIZAN ADRESON, ankaŭ profesion al Kuri Hubricht, en Leipzig-Neustadt (Germ.) Mariannenstr. 30, III. Vi poste ricevos senpage libron.

Listo de donacintoj por la XV-a:

Garantia Kapitalo.

H. C. Watlington £ 1.—. Dro. Blaas, Kramsach gmk. 200.—. Tobusch, Freiburg gmk. 200.—. Siegel, Unterlauter gmk. 5000.—. Desch, Homburg gmk. 1000.—. Nedĉla, Larz ĉ. kr. 20.—. Strenger, Zuffenhausen gmk. 500.—. Gleixner, Schloss Rosenau aŭstr. kr. 2000.—. Schneider, Haugsdorf aŭstr. kr. 1000.—. Ehrhardt, Neukölln gmk. 5000.—. F-ino Köhler, Zittau gmk. 100.—. Bowker, Sheffield gmk. 1.—. Révész, Pecs gmk. 500.—. Indra, Riga gmk. 20000.—. Schiebel, Bitterfeld gmk. 2000.—. F-ino Royer, Homburg gmk. 1000.—. Sergeant, Boulogne fr. fk. 20.—. Rosenberg, Tallinn est. mk. 50.—. Thiel, Zittau gmk. 200.—. Gohlhardt, Braunschweig gmk. 5000.—. F-ino Klech, Zittau gmk. 100.—. Enge, Pössnek gmk. 500.—. Kania, Radvanice ĉ. kr. 20.—. F-ino Marcus, Lodz gmk. 1000.—. Effenberger, Zittau gmk. 100.—. Namors, Linz aŭstr. kr. 1000.—.

Blindula kaso.

Franzke, Finsterbergen gmk. 50.—. Herrmann, Friedrichshaf gmk. 500.—. Hendel, Riesa a. Elbe gmk. 200.—. F-ino Kupfermink, Lodz gmk. 500.—. Aelska, Biržai lit. 5.—. S-ino Meyerhuber, Augsburg gmk. 500.—. Klene, Freiburg gmk. 50.—. Tobusch, Freiburg gmk. 500.—. Veiter, Freiburg gmk. 50.—. Hagemann, Freiburg gmk. 50.—. Bodnar, Budapest hung. kr. 1000.—. Siegel, Unterlauter gmk. 400.—. Eiter, Freiburg gmk. 50.—. Pollak, Saalfelden aŭstr. kr. 2500.—. Königshofer, Saalfelden aŭstr. kr. 2500.—. Palapies, Schenkendorf gmk. 500.—. Nedĉla, Larz ĉ. kr. 5.—. Heberer, Offenbach a. M. gmk. 100.—. Strenger, Zuffenhausen gmk. 1000.—. Dro. Rosenstock, Zagreb din. 10.—. S-ino Rosenstock, Zagreb din. 10.—. Dro. Heinrich, Zagreb d. n. 10.—. Dukić, Zagreb din. 10.—. S-ino Dubravčić, din. 10.—. Bleischmied, Eger gmk. 10000.—. Weber, Stuttgart gmk. 200.—. S-ino Parrish, Buffalo doll. 1.—. Blicher, København gmk. 10000.—. S-ino Jensen, København gmk. 25000.—. Pfeifer, Hattlingen gmk. 500.—. Gleixner, Schloss Rosenau aŭstr. kr. 2000.—. Mudrak, Wien aŭstr. kr. 5000.—. Schneider, Haugsdorf, aŭstr. kr. 1000.—. F-ino Stoll, Augsburg gmk. 500.—. Beck, Augsburg gmk. 1000.—. Ehrhardt, Neu-Kölln gmk. 100.—. Diebrailoff, Jena gmk. 250.—. Trejvas, Kaunas lit. 1.—. Ritz, Jonava lit. 1.—. Drechsler, Dresden gmk. 1000.—. Hammer, Leipzig gmk. 200.—. Nedkov, Leipzig gmk. 500.—. F-ino Köhler, Zittau gmk. 100.—. Bowker, Sheffield, shil. 10.—. Skupin Münster gmk. 100.—. Salokannel, Laihla f. mk. 10000.—. S-ino Janickiene, Kaunas lit. 2.—. Révész, Pecs gmk. 100.—. Düll, Fűrhi gmk. 500.—. Indra Riga rubl. 50.—. Mucke, Dresden gmk. 100.—. F-ino Muhi, Leipzig 1000.—. S-ino Sönderhauf, Reichenbach gmk. 1000.—. Siraka, Steirn gmk. 100.—. Kirsten, Harthau gmk. 500.—. Sergeant, Boulogne fr. fk. 5.—. Rosenberg, Tallinn, est. mk. 50.—. F-ino Dresden, Tallinn est. mk. 50.—. F-ino Budlarek, Hohenelbe ĉ. kr. 10.—. F-ino Thiam, Hohenelbe ĉ. kr. 5.—. F-ino Rottler, Hohenelbe ĉ. kr. 10.—. F-ino Grabau, Hamburg gmk. 1500.—. S-ino Kotzin, Kaunas lit. 5.—. Kops, Darmstadt gmk. 200.—. Zlatnov, Bela Slatina lev. 10.—. Gaĉevski, Bela Slatina lev. 10.—. Anderl, Teplice ĉ. kr. 10.—. Hoffmann, Zillina ĉ. kr. 10.—. Thiel, Zittau gmk. 200.—. Teickner, Essen gmk. 1000.—. Marienfeld, Hannover gmk. 1500.—. Lange, Syke gmk. 200.—. Schönfeld, Budapest gmk. 600.—. Herrmann, Hagen gmk. 1000.—. Schmid, Ingolstadt gmk. 500.—. Dro. Hiekel, Leimeritz ĉ. kr. 10.—. Schaffert, Essen gmk. 1000.—. Kahnt, Leipzig gmk. 250.—. Schmid, Reinhausen gmk. 500.—. F-ino Brenneck, Mannheim gmk. 500.—. F-ino Kleich, Zittau gmk. 500.—. F-ino v. Niemerski Harburg gmk. 500.—. Jensen, København dan. kr. 2.—. F-ino Noll, København dan. kr. 2.—. F-ino Kleinhardt, Lodz gmk. 500.—. Grünthal, Tallinn, gmk. 5000.—. Bühler, Harburg gmk. 200.—. Berkovičius, Kaunas lit. 2.—. Kania, Radvanice ĉ. kr. 10.—. F-ino Marcus, Lodz gmk. 1000.—. Effenberger, Zittau gmk. 100.—.

Donaca Kaso.

100 gmk. aŭ malpli:

Franzke en Finsterbergen, Gebhardt en Berlin, Klene, Vetter, Hagemann, Eiter en Freiburg, Heberer en Offenbach a. M., Köhler, Effenberger en Zittau, Révész en Pécz, Plank en Wien, Draiver en Varsavio, Schneider kaj Bachmann en Chemnitz.

200 gmk. aŭ pli:

Kleasig en Lageritz, Herrmann en Bildstock, Meyerhuber, Stoll en Augsburg, Esp. Grupo en Danzig, Tobusch en Freiburg, Siegel en Unterlauter, Palapies en Schenkendorf, Prestele en Lorch, Strenger en Zuffenhausen, Allg en Halle, Weber en Stuttgart, Diebrailoff en Jena, Lehmann en Werdau, Skupin en Münster, Düll en Fűrhi, Zacher en Prien, Thiel, Kleich en Zittau, Lange en Syke, Kahnt en Leipzig, Kleinhardt en Lodz, A. Steler, K. Seier en Tabarz.

1000 aŭ pli:

Sveda fraŭlino 5000. Blicher en København 100000; Jensen en København 25000, Schmidt en Merseburg 1000, Vogt en Stuttgart 2000, Strasse en Berlin 1000, Schiebel en Bitterfeld 1000, Pazelt en Obergrund 5294, Block en Berge-dorf 1000, Grabau en Hamburg, Esperanto Triumfonta en Horrem 80000, H. Jung en Mehlum 20000, Teickner 1000, Esperantistaro en Nymegen 60000, Herrmann en Hagen 1000, Hahn en Oshlis 1000, Schaffert en Essen 1000, Grünthal en Tallinn 1000, Marcus en Lodz 1000, Thoma en Köln 1000, Schmiedinger en Linz 1000

Allaj valutoj:

Samuel en Cluj 10 leoj, Kals en Wien 7500 a. kr., Bodnar en Budapest 100 h. kr., Pollak en Saalfelden 2500

FILATELISTOJ! Kiu sendas al mi 100—1000 poŝtmarkojn alilandajn nedifektajn, ricevas saman kvanton de Hispanujo laŭ lveri 1923. Gabriel Alomar, Prez. de EKP, sir. Vallori 14 en Palma de Mallorca (His.)

Korespondo kaj Interŝango.

S-o Penko Stoev, Banque nationale de Bulgarie en Plovdiv (Bulg.) korespondas kun bankoficistoj amerikaj kaj britaj pri bankaferoj.

H. Decuyper, Postrhofel 5, en Berchem-Anvers (Belg.) serĉas korespondadon, sed nur kun japanoj.

F-ino Alina Ryyänönen, Mellask. 14, as 4 en Viipuri (Finnl.) deziras interŝangi il. pk. kun ĉiulandaj gesamideanoj

Filatelistoj kaj kolektistoj! Se vi deziras rusajn pm. aŭ papermonon sendu al mi esp. librolajn ktp. Mi havas amason da ĉiusepacaj rusaj pm. Laŭ deziro mi sendas ankaŭ rusajn gazetojn kaj ĵurnalojn. A Lebedev poŝt telegrafa kontoro en Tver (Rusl.)

S-o Sala Cesarino, poŝtoficisto en Mantova (Italujo) deziras korespondi kun ĉiulandaj gesamideanoj per il. pk. kaj fotografaĵoj.

F-ino Maria Sternad, studentino en Alba Julia (Ruman.) deziras korespondi per il. pk. kaj let. kun ĉiuj landoj.

Alfred Bellem en Tallinn, Lembitu t. 23.1 (Estl.) deziras korespondi per il. pk. pri populivo kaj tipoj kun ĉiuj landoj.

Nagoja Esperanta Studentaro, prez.: s-o Joŝi H. Išiguro, P. O. Box 46 en Nagoja (Japanujo) petas alsendon de ĉiuj Esperantaĵoj por propagando kaj projektiita ekspozicio.

S-o Emile Marion 39 cours Ragon en St. Denis s/Seine (Franc.) deziras korespondi per il. pk. al let. kun gesamideanoj en ĉiuj landoj, ankaŭ interŝangas pm.

a. kr., Nedĉla en Larz 5 ĉ. kr., Gleixner en Schloss Rosenau 2000 a. kr., Rothstein, Placzek, Zimmermann en Wien 8000 a. kr., Beigel, Brunner, Friedmann, Stojanoff en Wien 3000 a. kr., Schneider en Haugsdorf 1000 a. kr., Kettunc en Joensuu 25 f. mk., Bowker en Sheffield 10 sh., Indra en Riga 60 rubl., Hidma en Amsterdam 25 hfl., Sergeant en Boulogne 5 f. fr., Rosenberg en Tallinn 50 emk., Dreesen en Tallinn 50 emk., Salikkola en Viipuri 5 fmk., Parviainen en Viipuri 5 fmk., Zlatanov en Bela Slatina 10 lev., Gaĉevski en Bela Slatina 10 lev., Hoffmann en Zilina 10 ĉ. kr., Miller en Edinburgh 40 sh., Hugal en Gvöngyŝs 100 ĉ. kr., Noll en Köbenhavn 3 d. kr., Kania en Radvanice 10 ĉ. kr.

Dr. Vogt'sche Bank, Stuttgart, Germ.

Wallruthbau Komandit-Societo Friedrichstr. 13

Telefona: N-oj 11458 kaj 11459. — Telegr.-Adreso: Bankvogt

Aĉeto kaj vendo de valorpapiroj.
Procentado de kontantaj deponoj.
Aĉeto kaj vendo de fremdaj valutoj.
Perado de ĉiusepacaj negocoj.

ESPERANTISTA CENTRA LIBREJO,

51, rue de Cléchy, Paris.

Eldonejo de la Verkoj de D-ro L. L. Zamenhof

kiujn ĉiu Esperantisto devas legi.

Ĉefaj verkoj aĉeteblaj:
Fundamenta Krestomatio, enenanta la „Ekzercaro“-n (el la „Fundamento de Esperanto“), „Fabeloj kaj Rakontoj“-n, „Artikoloj pri Esperanto“-n, „Poezioj“-n. Unu dika libro 460-paĝa. Franc. Franko 8.—
Georgo Dandin, komedio en tri aktoj de Molière. Unu libro grandformata 2.—
Hamleto, tragedio en kvin aktoj de Shakespeare. Unu libro mezformata 3.—
Ifigenio en Taŭrido, dramo en kvin aktoj de Goethe. Unu libro grandformata 6.—
Proverbaro Esperanta, laŭ la verko „Frazologio rusa-pola-franca-germana“ de M. F. Zamenhof (1282 proverboj). Unu libro grandformata 3.—
La Rabistoj, dramo en kvin aktoj de Schiller. Unu libro grandformata 4.—
La Revizoro, komedio en kvin aktoj de N. V. Gogol. Unu libro grandformata 4.—

Verkoj baldaŭ aperontaj aŭ reapertaj:
Fabeloj de Andersen. Plena kolekto. Unu libro grandformata —
Marta, rakonto de Eliza Orzeszko. Unu lib. o grandformata —
La Rabeno de Bahara, romano de H. H. ine. La Olmnaziano, monologo de Salom Alajhem. Unu libro grandformata —
Lingvaj Respondoj aperintaj en „La Revuo“. Unu libro grandformata —

Oni aldonu al la prezoj, plie por la sendkostoj: 15% + 0,25 fr. en Francujo; 20% + 0,75 fr. en aliaj landoj.



S-o J. Mets, U'e Vöhma, Koksvere (Estl.) deziras korespondi kun ĉiuj landoj.

S-o Paul Mänd, en Ambla (Estl.) kolektas diversajn vidindaĵojn por konatigi lokajn ĝeneralejojn kun eksterlando. Ĉiuj pk. devas esti koloraj kaj tute puraj, t. e. neskribitaj. Akceptataj estas sendaĵoj (per rekomendita presajo) po 25 pk. Kontraŭsendataj estas ĵu 40 stamp. pm. de Estonujo, Rusujo kaj aliaj kaj kelke da papermonoj eldonitaj de ĝeneralo Judent. Ne ŝangas pm. kaj papermonon. Ne korespondas.

S-o Otto Dietrich en Fürstenaŭ Nr. 50, Post Lauenstein (Saksujo, Germanl.) deziras interŝangi vidaĵkartojn, pm., fotografaĵojn kaj monerojn kun la tuta mondo. Mi petas legeblan adreson.

L. Lürssan en Haapsalu, Saks 6 (Estl.) deziras interŝangi pm. kun seriozaj filatelistoj, pretere laŭ katalogoj Senf 1922, Michel 1923.

25-jara fraŭlo deziras korespondi kun serioza fraŭlino por poŝta edziĝo. Henri Pigeon, 5bis rue Pasteur en Kremlin-Bicêtre (Seine) (Francujo).

Fraŭlo Josef Heister kaj fraŭlo Franz Hinterlandtner en Traisen 125 (Aŭstr.) deziras korespondi per il. pk. kaj let. kun ĝejunuloj el la tuta mondo.

S-o Marjo Piubello, fervojoisto, via Saponaja 34, en Mantova (Ital.) deziras interŝangi il. pk. kaj korespondi letere kaj poŝtkarte kun ĉiulandaj kolegoj.

Udine (Italujo) — Ten. Colonnello Silvio Crutinovis — Di-stretto Militare — deziras interŝangi pm. kun la tuta mondo.

S-o Jasaburo Cugaŭa, advokato n-o 63, Kobataĉo. Sasebo, Nagasakiken (Kiuŝu, Japanujo) deziras korespondi pri kiu ajn temo.



NEDERLANDA ANONIMA SOCIETO LUKSA-PANO FABRIKOJ

ANTAŬE HENRI J. CARELS.

50 BUTIKOJ: DEN HAAG, HAARLEM, AMSTERDAM. LUNĈEJO CARELS (ĈEFO: H. A. SCHARWÄCHTER.) DEN HAAG, 63 WEIMARSTRAAT. ONI PAROLAS ESPERANTON.

ATENTU POŝT MARK KOLEKTANTOJ!

Ĉu vi volus ricevi markojn elektajn kun belaj aŭstraj kaj alilandaj pm.? — Se jes, tiam skribu mi al la suba adreso kaj vi ricevos belan sendaĵon por propra aĉeto aŭ komisia vendado. Kun progresintaj kolektantoj ankaŭ interŝango! — Sendu vian mankolliston kaj postulu prezaron.

Josefo Kolnhofer, Wien, 13,5 Zehnergasse 37.

Gvidilo tra Bialystok, la nask-urbo de nia Majstro.

32 paĝoj, kun 6 ilustraĵoj.

Prezo: bonvalutuloj 0.80 sviz. fk., malbonvalutuloj 0.30 gmk. × ŝlosilnombro, ET-abonantoj la prezo de unu ET-numero (pagon ni prenos laŭdeziro de la abon-konto).

Eldonejo de „*Esperanto Triumfonta*“ (T. & H. Jung) Horrem bei Köln.

Ni liveras nur librojn de ni mem eldonitajn. Pro aliaj verkoj sin turni al Butin & Jung en Godesberg.

Ĉu vi jam posedas la klasikajn verkojn?

Goethe, Hermano kaj Doroteo, gmk. 1.20 × ŝlosiln., avis. fk. 1.20 por bonvalutuloj.

Lessing, Minna von Barnhelm, gmk. 0.80 × ŝlosiln., avis. fk. 0.80 por bonvalutuloj.

Raabe, La nigra galero, gmk. 1.20 × ŝlosiln., avis. fk. 1.20 por bonvalutuloj.

Seidel, Vintro-Fabeloj, gmk. 1.50 × ŝlosiln., avis. fk. 1.50 por bonvalutuloj.

Avsejenko, Fraŭlino Suzano, gmk. 0.90 × ŝlosiln., avis. fk. 0.90 por bonvalutuloj.

Por sendkostoj oni aldonu 10 procentojn al la supre nomitaj prezoj.

Butin & Jung, Godesberg (Germanujo)

Esperanto-Eldonejo, Bahnhofstr. 30

Postbeka konto Köln 92036.

Ĉu vi jam posedas la klasikajn verkojn?

Goethe, Hermano kaj Doroteo, gmk. 1.20 × ŝlosiln., avis. fk. 1.20 por bonvalutuloj.

Lessing, Minna von Barnhelm, gmk. 0.80 × ŝlosiln., avis. fk. 0.80 por bonvalutuloj.

Raabe, La nigra galero, gmk. 1.20 × ŝlosiln., avis. fk. 1.20 por bonvalutuloj.

Seidel, Vintro-Fabeloj, gmk. 1.50 × ŝlosiln., avis. fk. 1.50 por bonvalutuloj.

Avsejenko, Fraŭlino Suzano, gmk. 0.90 × ŝlosiln., avis. fk. 0.90 por bonvalutuloj.

Por sendkostoj oni aldonu 10 procentojn al la supre nomitaj prezoj.

Butin & Jung, Godesberg (Germanujo)

Esperanto-Eldonejo, Bahnhofstr. 30

Postbeka konto Köln 92036.

Mi vokas vin per la fajfsignalo Vivu Esperanto

Marŝo Esperantista de A. Menzel.

Eldonoj: Por citro sviz. fr. 0.50, Por fortepiano sviz. fr. 0.80, Por fortepiano kaj violono sviz. fr. 1.—, Por malgranda orkestro sviz. fr. 1.75, Por granda orkestro sviz. fr. 2.25, Por ĉiu orkestrparto sviz. fr. 0.20.

Sendkostoj 10 %

Mendu ĉe:

G. Menzel, Leipzig-Gohlis, Menckestrass 41, Germ.

Karaj gesamideanoj! Tutekore mi dankas por viaj afablaj sendaĵoj. Ĉar mi ricevis 500 skribaĵojn, estas tute neeble al mi, respondi ĉiujn. Kiuj sendis al mi pm., gazetojn ktp., tiuj ricevos respondon. Gerda Spiess en Danzig, Goldschmiddegasse 25.

Mikaelo Sergejeviĉ Potokin, 145 a radio-stacio, O. K. A. en Tiflis (Georgio, Kaŭkazo) deziras interŝangi il. pk. kaj let. kun alilandanoj.

S-o Br. Rafsiĉ, Kralja Petra 44 en Zemun (Jugosl.) deziras interŝangi pm. kaj portretfotografaĵojn kun ĉiulandaj gesamideanoj.

S-ino Irene Schwarz, Sobinovska ul. 35 en Prešov (Ĉeĥosl.) deziras koresp. K. ĉ. l. P. a. biko. Interŝangas Esp. aĵojn, kaj kolektaĵas Esp. gazetojn.

S-oj Ariotta Karlo kaj Mazzia Rinaldo, oficistoj Genio Marina — Saseno (Sud-Ital.) deziras interŝangi pm. kaj il. pk. kun la tuta mondo.

S-o Adolph Tremouille, rua Jão do Outelro 56—2 en Lisboa, (Portug.) serĉas korespondantojn por siaj lernantoj.

Mi deziras sinceran kaj seriozan interŝangadon de pm kun ĉiulandanoj. Ĉia kvanto estas bonvena; sendu unue! (Mi estas kongresviziinto). Fried. Hahn en Bremen, (Germ.) Riensbergerstr. 22.

S-o A. Bürgsten, Fridhem en Sockenbaka (Finnl.) deziras interŝangi pm. (laŭ Senf-katalogo) kun ĉiuj landoj.

Anglaĵ gesamideanoj! Mi deziras interŝangi oftan anglan korespondadon de nun ĝis serioza ekzameno pri angla lingvo kaj literaturo. Ĉu mi povos interŝangi utilajn vin? Maria Antoinette Camurri, Corso Vittorio Emanuele 305, en Roma 12 (Italujo).

Leopold Prager, lerneja direktoro, en Wien 2, Hollandstr. 15 interŝangas pm. kun la tuta mondo.